

UNESKO

Kuriero

Aprilo-Junio 2023

ISSN 2096-9082



9 772096 908232

Adis-Abebo,
Istanbulo, Parizo,
Seulo, Vieno...
Monda vojaĝo
de kafo

- Etiopio,
la hejmlando de kafo
- Eta lukso renkontas
egan sukceson en
Korea Respubliko

- La bonaeraj
kafejoj,
protektitaj
heredaĵoj

NIA GASTO

**Diébédo Francis
Kéré, arkitekto**
"Mi laboras kun
la naturo, ne
kontraŭ ĝi"

KAFEJOJ: MIKSAĴOJ DE KULTUROJ

中国
报道
EL POPOLA
ĈINIO
www.espero.com.cn



unesco



**Abonu la presitan version en
ĉiu trimonato
aŭ
abonu 100% senpage la
bitversion.**

Malkovru niajn ofertarojn



<http://www.espero.com.cn/>; <http://esperanto.china.org.cn/>;
<https://www.chinaesperantoligo.com.cn/kuriero/>



**Sekvu la lastajn
novaĵojn de *Kuriero*
@unescocourier**



Facebook



Twitter



Instagram



Legu kaj disvastigu

**Disvastigu kaj reklamu
UNESKO-Kurieron laŭ Libera Aliro
(Open Access), laŭ reguloj de UNESKO
por publikaĵoj.**

2023 • n-ro 2 • Eldonata ekde 1948

UNESKO-Kuriero estas eldonata kvarfoje jare, de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO). Ĝi antaŭenigas la idealojn de UNESKO, diskonigante ideojn pri internacie gravaj temoj, konforme al sia mandato.

Direktoro: Matthieu Guével

Ĉefredaktoro: Agnès Bardón

Asista redaktoro: Katerina Markelova

Sekcia redaktoro: Chen Xiaorong

REDAKTOROJ PRI LINGVOJ:

Angla: Anuliina Savolainen, Gina Doubleday (prolegado)

Araba: Fathi Ben Haj Yahia

Ĉina: Chen Xiaorong kaj Ĉina Tradukejo kaj Eldonejo

Franca: Christine Herme (prolegado)

Hispana: Laura Berdejo

Rusa: Marina Yartseva

Cifereca redaktoro: Mila Ibrahimova

Fotoj kaj ilustraĵoj: Danica Bijeljac

Kunordigado pri traduko:

Hélène Menanteau

Administracia kaj redakcia asistanto:

Carolina Rollán Ortega

Produktado kaj antaŭenigo:

Ian Denison, Estro pri publikigado kaj varmarkada antaŭenigo de UNESKO

Eric Frogé, Ĉefa asistanto produktada

Amaskomunikilaraj Rilatoj: Laëtitia Kaci

Fasonado: Jacqueline Gensollen-Bloch

Kovrila bildo: © Boris Séméniako

Kuneldonaj redaktoroj

Esperanto: Chen Ji

Kataluna: Jean-Michel Armengol

Informo kaj Kopirajtoj:

courier@unesco.org

7, place de Fontenoy,

75352 Paris 07 SP, France

© UNESKO 2023



Periodaĵo, alirebla en Libera Aliro (Open Access) sub la licenco Attribution ShareAlike 3.0 IGO (CC BY SA3.0 IGO) (<http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/igo/>). Uzante la enhavon de ĉi tiu eldonaĵo, la uzantoj devas observi la priuzajn kondiĉojn de UNESKO-

Danke al la grandanima apogo de Ĉina Popola Respubliko

Deponejo de Libera Aliro (Open Access Repository) (<http://en.unesco.org/open-access/>). La supra licenco koncernas ekskluzive la tekstojn. Por uzi la bildojn, oni devas peti permeson. La indikoj, uzitaj en tiu ĉi eldonaĵo, kaj la prezento de la donitaĵoj ne implicas esprimon de ia ajn opinio de fanke de iu ajn lando de UNESKO koncerne la leĝan staton de iu ajn lando, teritorio, urbo aŭsfero de ties regado aŭkoncerne markadon de landlimoj. La artikoloj esprimas la opiniojn de la aŭtoroj, ne nepre reprezentas la opiniojn de UNESKO, kiu ne respondecas pri ili.

Malgarantio: UNESKO ne garantias la konformon de la Esperanto-eldonaĵo al la originala numero en la ses oficialaj lingvoj de la Organizaĵo.

La bitversio haveblas senpage ĉe

<http://www.espero.com.cn/>

<http://esperanto.china.org.cn/>

http://uea.org/revuoj/unesko_kuriero

Supera organizo: Ĉina Internacia

Komunika Grupo (ĈIKG)

Subtena organizo:

Universala Esperanto-Asocio

Eldono: El Popola Ĉinio

Prezidanto: Chen Wenge

Ĉefredaktoro: Zhao Jun

Vicprezidantoj: Wang Hanping,

Wang Wei, Yu Wen

Ĝenerala administristo: Zhao Quanyong

Aganta ĉefredaktoro: Chen Ji

Tradukantaro: El Popola Ĉinio kaj UEA-

Teamo

Prolegantoj: Chen Ji, Mao Zifu, Rafael

Henrique Zerbetto, Rob Moerbeek kaj

José Antonio del Barrio

Presita de Limigita Kompanio Yincheng-

Beichuang en Pekino

Kunlaboranto: Zaozhuang-a Universitato

Adr: P.O. Kesto 77, Beijing CN-100037,

Ĉinio

Tel: +86-10-68996130

+86-10-68996590

Retpoŝto: lamondo@163.com

CN 10 - 1711/C ISSN 2096 - 9082

Prezo: 6.8 eŭroj

LARĜA ANGULO

Kafejoj: Miksaĵoj de kulturoj

Lokoj de renkontiĝoj kaj civitaneco 4

Jean-Michel Djian

La bonaeraj kafejoj, protektitaj heredaĵoj 8

Natalia Páez

“Tria ejo”: Vera spaco por urbanoj 12

Ray Oldenburg kaj Karen Christensen

Turka kafo, ne nur trinkaĵo sed kulturo 15

Fulya Ozerkan

Tsinari, postrestaĵo de la otomana pasinteco de
Tesaloniko 17

Meropi Anastasiadou

Etiopio, la hejmlando de kafo 19

Éloi Ficquet

Eta lukso renkontas egan sukceson en Korea
Respubliko 22

Sooyoung Oh

“Kafejoj estas kataliziloj de sociebleco” 24

Intervjuo kun Pierre-Emmanuel Niedzielski

LiberThé, kovejo de civitaneco en Tunizo 26

Frida Dahmani

ZOMO

La naturo de aĵoj 28

Fotoj: Rinko Kawauchil

IDEOJ

Teknodiverseco kiel la ŝlosilo al cifereca
malkoloniigo 38

Domenico Fiormonte

Repensi teknodiversecon 42

Yuk Hui

NIA GASTO

“Mi laboras kun la naturo, ne kontraŭ ĝi” 46

Intervjuo kun Diébédó Francis Kéré

PLI DETALE

Transformi edukadon: Prioritatigi la sanon kaj
bonfarton de la lernantoj 50

Ĉefartikolo

“Iuj trinkaĵoj havas la econ perdi sian allogon, sian guston, sian kialon ekzisti, kiam oni trinkas ilin aliloke krom en kafejoj.” Ĉi tiuj vortoj de franca verkisto Joris-Karl Huysmans neniam sonis pli veraj ol dum la sinsekvaj enfermoj rilate al la pandemio pro KOVIM-19. Senigitaj je ĉi tiuj lokoj de kunvivado dum monatoj, ni estis kolektive kapablaj taksi ilian neceson. Kaj kiom la foresto de kafejoj igis urbojn malgastamaj.

Ĉi tiuj “trijaj ejoj”, ĉe la limo inter publikaj kaj privataj ejoj, havigas esencan spireblecon en la urba frenezo. Kontraste al la anonimeco de grandaj urboj, ili sin proponas kiel spacoj de renkontiĝo kaj diverseco, kie tempo estas malpli limigita kaj parolo estas pli libera. Per kuraĝigo por debato kaj interŝanĝoj, kafejoj kontribuas laŭ sia propra maniero al la libera fluo de ideoj kaj dialogo, kiujn UNESKO favoras.

Multaj kontraktoj estis finfaritaj, ideoj diskutitaj kaj libroj verkita super taso da kafo. Per sia historio kaj arkitekturo, iuj kafejoj fariĝis veraj institucioj kaj heredaĵoj kiujn urboj celas protekti. La plej gloraj povas ankoraŭ esti hantataj de la fantomoj de artistoj kiuj patronis ilin, kiel la kafejo *Café A Brasileira* en Lisbono, kiun vizitadis Fernando Pessoa; la kafejo *London City* en Bonaero, restadejo de Julio Cortázar; aŭ tiu de Vieno, *Imperial Hotel*, la plej ŝatata de Sigmund Freud kaj Stefan Zweig.

Post la malkovro de ĝiaj stimulaĵoj ecoj en Abisenio (nun Etiopio), kafo fariĝis universala trinkaĵo, kaj ĝia preparado estis la temo de du enskribiĝoj en la Listo de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj de UNESKO. “Kafdomoj” plimultiĝis unue en la Proksima Oriento, poste en la Otomana Imperio, antaŭ atingo de Eŭropo, Ameriko kaj nun Azio, formante kulturon kaj vivmanieron. Ekzistas certa nedifinebla plezuro, kiu venas kun la etoso de la loko, la libereco de momento for de ĉiutagaj devoj, kaj la renkontoj kiuj okazas tie. Fenestroj al la mondo, kafejoj estas invito al vojaĝo.

Agnès Bardón,
Ĉefredaktoro

-El la angla esperantigis Renato Corsetti (Italio)

Kafejoj: Miksaĵoj de kulturoj

Bufedo, kelkaj tabloj kaj la okazo preni trinkaĵon kontraŭ malalta prezo – ĉu tio estas ĉio, kion signifas kafejo? Evidente ĝi estas pli ol tio. Oni iras en kafejon por negoci, renkontiĝi, revii aŭ labori. Tie la restado estas familiara kaj interŝanĝoj estas liberaj. Tiel libera, fakte, ke kafejoj ekscitis la suspekton de la religiaj kaj politikaj aŭtoritatoj, kiam ili ekaperis en la 16-a jarcento. Nun ili troviĝas mondvaste, ĉu en Bonaero, Vieno, Istanbulo, Adis-Abebo aŭ Seulo. Frekventitaj de bohemianoj, glorataj de aŭtoroj, kelkaj kafejoj iĝis eĉ mitaj lokoj. Kvankam ili estas premataj de la ekapero de novaj mondvastaj agantoj, de la bezono reagi al ŝanĝoj de konsumadkutimoj aŭ de la trudado de ekranoj, la kafejoj ankoraŭ restas ŝlosilaj figuroj en la urboj.

Laŭ kelkaj studoj, kafo estas la dua plej konsumita trinkaĵo, post akvo. Ĉiujare ne malpli ol 150 milionoj da kafsakoj el Sud-Ameriko, Afriko kaj Vjetnamio cirkulas ĉirkaŭ la mondo. Laŭ takso, proksimume 100 milionoj da personoj sin vivtenas per tiu trinkaĵo, inkluzive de kafej-posedantoj kun siaj sub-kontraktantoj kaj siaj dungitoj. Nur la monda kafekonomio reprezentas merkaton kun taksita valoro de 17 miliardoj da usonaj dolaroj.

Laŭlonge de jarcentoj, kafo gajnis reputacion kiel trinkaĵon “tonika”, kapabla, dank'al la enhavata kafeino, vekigi kaj vigligi la menson, laŭ d-ro Amédée Le Plé, en sia verko *Scienca Historio de Kafo* (1877). Estis ĝuste tiuj stimulaĵoj, kiuj ekscitis la suspekton de religiaj aŭtoritatoj en arabaj landoj, kie la kafekomercado unue disvastiĝis. Ekde tiam la budoj, kie oni povis gustumi *kahva*-on, multe pliiĝis. Komence de la 16-a jarcento, troviĝis proksimume 2 000 kafejoj nur en Kairo. En Konstantinopolo (la nuna Istanbulo) viroj – miksiĝo kun virinoj maldecis – renkontis unu la alian en tiel nomataj *kahve kanes*, specoj de butikoj rezervitaj por aĉetantoj de kafo, sed ankaŭ por konsumantoj.

En la 17-a jarcento tiuj ejoj disvastiĝis en Eŭropo, precipe en Londono, Marsejlo kaj Parizo. En 1675, en Anglio ekzistis pli ol 3 000 “kafdomoj”. Sed baldaŭ ili estis konsiderataj kiel lokoj de protestoj kaj opozicio. Pro dekreto de la Reĝo Karlo

la Dua (1630-1685), ili estis fermitaj. Tamen, la principo de la “kafdomo” daŭris en aliaj formoj kaj allogis kreskantan nombron de klientaro.

Pli ol nur trinkejo, la kafejo unue signifis lokon, poste kutimon, kaj ekde la 18-a jarcento ĝi estas universala socikultura praktikado, integrita en la urbo.



© Pierrick Bourgaud



▼ Ŝakoludado en kafejo de la vilaĝo Buzet en Kroatio.

“

Probable la kafejo ne plu estas la plej grava ejo por interŝanĝi ideojn, debati kaj disvastigi ilin, tamen ĝi restas la plej bona loko por formi opiniojn

Bufedo, kelkaj tabloj kaj tasoj

Kio estas kafejo, se ne kvar muroj kaj plafono impregnita per la aromo de rostado, taso, subtaso, kaj kuleretoj kuŝantaj sur bufedo aŭ tablo? Krome menciindas, ke surprize malpli da studoj ekzistas pri tiu loko, kies rolo ne multe ŝanĝiĝis de la 17-a jarcento. Kie ajn ĝi establiĝas, la kafejo iĝas la plej taŭga ejo por renkontoj. Ĝi estas paradoksa – ĉi tie renkontiĝas solecemo kun societemo. La nura privata loko, kiu ofertas al siaj klientoj la liberecon de parolado, de interŝanĝo, de legado aŭ skribado, eĉ kantado aŭ dancado kontraŭ la nura devo: preni trinkaĵon. Tutmonde ĉiuj kafejoj plenumas ĉi tiun difinon.

Asertinte, ke “la kafejo estas la plej solida institucio en Francio”, la franca aŭtoro Léon-Paul Fargue ne nur parolis pri kafo kiel nektaro de la etiopia kafarbo, sed ankaŭ pri la multegaj nedetermineblaj lokoj, kiuj enradikiĝis en vilaĝoj kaj kamparaj regionoj, aŭ pligrandiĝantaj aŭ restantaj samgrande en la daŭro de unu jarcento.

Ne surprize, artistoj kaj verkistoj sentas sin komfortaj tie konversacii aŭ kreadi. Kelkaj kafejoj, kiel *Café de Flore* aŭ *Les deux Magots* en la distrikto Saint-Germain-des-Prés en Parizo, estas nedisigeblaj de la intelekta eksciteco en la postmilita tempo. Kiuj pli bone ol Claudio Magris en Triesto, Douglas Kennedy en Nov-Jorko, Zoé Valdés en Havano, Stefan Zweig en Vieno, aŭ Émile Zola en Parizo, en siaj verkoj preparolis por la kafejoj, rakontis pri ilia eterna, frateca kaj universala karaktero? Oni vidu, kun kia fideleco la klientoj, ĉu riĉaj ĉu malriĉaj, sin dediĉas al tiuj lokoj, tie bildigas socion kaj interrilatas kun aliaj homoj. “Por solulo, kafejo estas la nura eblo ne resti tute sola”, asertas la eurborda verkisto Ahmadou Kourouma.

Imaĝo kaj scenejo

Estas la nomŝildo, kiu faras iun ejon kafejo, kaŭzante certan animstaton. Estas la adreso, kiu sugestas rendezuon, kaŭzas imagon aŭ fariĝas scenejo. La kafejoj *Griensteidl* en Vieno, *San Marco* en Triesto, *Café Riche* en Kairo, *Garota d' Ipanéma* en Rio-de-Janeiro, *Procopé* en Parizo aŭ *Pierre Loti* en Istanbul estis ne nur nestoj de agitado, sed ankaŭ pacaj insuloj aŭ rifuĝejoj por poetoj antaŭ ol fariĝi legendoj.

© Pierrick Bourgault



▼ *Café Florian, fondita en 1720 en Venecio.*

Multo restas nedirita en kafejo, pro certaj kialoj; oni ne vere scias, kion oni trovos tie, kion diri, kia hazarda renkonto povus okazi tie. Probable la kafejo ne plu estas la plej grava ejo por interŝanĝi ideojn, debati kaj disvastigi ilin, tamen ĝi restas la plej bona loko por formi opiniojn, ĉu pri politiko, sporto aŭ artoj.

Ne eblas eskapi el la destino de kafejo kaj ĝiaj ritoj, eĉ en tempo, kiam komputiloj kaj poŝtelefonoj ofte anstataŭas akompanantojn de la klientoj. Novaj internaciaj markoj nun reagis al novaj tutmondigitaj sociaj praktikoj, ankaŭ al novaj postuloj. La hodiaŭaj kafejoj ofertas nun sortimenton de aromoj kaj devenlandoj senfine pli vastan ol pasintecaj kafejoj. Samtempe, la evoluo de la merkato favoras pionirajn markojn, kiuj kapablas organizi pli justan ekonomion inter malgrandaj produktantoj kaj konsumantoj.

Demokratio kaj vivarto

Estis en la 19-a jarcento, kiam la societema kaj komerca karaktero de la kafejo iĝis fundo en la ideo de demokratio. Ne estas cenzuro en kafejo, ĝi estas neformala kadro por la imagado, spaco de libereco kaj societemo, unika en la homa historio.

Sed la kafejoj travivas nun profundan ekonomian kaj socian metamorfozon, kiu sin montras per la malapero de multaj el ili. Ĉi tiu tendenco akcelis post la restriktaj rimedoj, kiujn postulis la pandemio. En Kanado, Japanio, Argentino aŭ Germanio, la

restriktoj surmetitaj de la publikaj aŭtoritatoj kaŭzis kelkajn definitivajn fermiĝojn.

Antaŭ la krizo de KOVIM-19 ekzistis en Francio proksimume 30 000 kafejoj. Hodiaŭ ili estas ne pli ol 20 000, trioble malpli ol en la mezo de la 1950-aj jaroj, laŭ takso de Josette Halégoi kaj Rachel Santerne, aŭtoroj de *Vivo ĉe bufedo. La trinkejo, la socia ligilo, kiu nin kunigas (Une vie de zinc. Le bar, ce lien social qui nous unit)*.

Nuntempe, la karaktero de kafejoj en grandaj urbocentroj ŝanĝiĝas. Individuismo, pli malgrandaj apartamentoj kaj certa

formo de mezklasiĝo lasis prosperi en la koro de la kafejo novan bildon pri nuntempo. Muziko kaj ekranoj ekaperis, kaj studentoj prenis siajn lokojn. Ĉi tiuj du akompanaj fenomenoj ne ŝanĝis ion por tiuj vivolokoj. Al kiu ajn socia formo ili transformiĝos, ili restos aktivaj, kreivaj kaj ofte plezurigaj lokoj por renkontiĝoj kaj civitaneco. ■

**-El la franca esperantigis
Frank Lappe (Germanio)**

▲ *La internaĵo de la Kafejo Riche en Kairo, kun portreto de la fama kaj populara egipta kantistino Oum Kalthoum.*



© Denis Dailleux / Agence VU

La bonaeraj kafejoj, protektitaj heredaĵoj

Famigitaj de verkistoj, menciitaj en tangotekstoj kaj ŝatataj de la arta bohemiano, kafejoj konsistigas eron de la animo de la argentina ĉefurbo. La plej famaj el ili gajnis jam de kelkaj jaroj la titolon *Rimarkindaj Kafejoj kaj Trinkejoj*, markon ne nur agnoskantan ilian estetikan valoron, sed ankaŭ la gravan rolon, kiun ili ludis – kaj ankoraŭ ludas – en la kulturo de la urbo.



© Julieta Christoflakis

Estis la dekunua matene de dimanĉo, la 18-a de decembro 2022. Restis ankoraŭ unu horo antaŭ la fino de la finalo de la Monda Pokalo inter Argentino kaj Francio. La trinkejo *El Banderín* (*La Flageto*) vibradis. Klientoj kun ĉemizoj kaj ĉapoj samkoloraj kiel tiuj de la sporta uniformo de la nacia teamo venis kaj sidiĝis miksite ĉe la tabloj por spekti la matĉon, tute senkonsidere pri tio, ĉu ili estas konatoj aŭ fremduloj. Kelnerinoj kaj kelneroj zigzagis inter la tabloj ĵonglante per siaj pletoj, sur kiuj ili portis bierojn, manĝetaĵojn kaj gasakvajn sifonojn, kiujn neniu mendis. Tio estis donaco de la trinkejo.

Tiu ĉi eta trinkejo situanta en la tango-kvartalo Almagro fariĝos 100-jara la venontan novembron. Ĝi posedas unu el la plej kompletaj kolektoj de flagetoj de futbalaj teamoj en la lando: ili tapiŝas ĉiujn ties murojn de la planko ĝis la plafono. Ses metrojn longa ĉielblua kaj blanka flago kovras la tutan bufedon. Kiel multaj el tiaj trinkejoj, *El Banderín* estis fondita de familio de hispanaj enmigrintoj, kiu, kvar generaciojn poste, ankoraŭ posedas ĝin, sed kies administrado estas nuntempe sub la zorgo de Luis, malnova dungito, kiu okupiĝas pri ĝi kune kun sia familio.

Ĝi unue estis diversvara vendejo nomata *El Asturiano*, en kiu ankaŭ

▼ La centjara trinkejo El Banderín havas impresan kolekton de flagetoj de futbalaj kluboj.

▼ *Portreto de la fama argentina verkisto Julio Cortázar en la kafejo London City, kie li verkis sian unuan romanon en 1960.*

troviĝis tabloj, ĉe kiuj viroj kutime sidigis por trinki ĝinon, vermuton aŭ vinon kun gasakvo post laboro. Al tiu vendejo ofte venis la patrino de la plej renoma tango-kantisto de ĉiuj tempoj, Carlos Gardel, kies domo-muzeo situas proksime. Ĝiaj aĉetoj restis manskribe registritaj en kontkajero sub ŝia nomo. En tiaj vendejoj estis ofta kutimo vendi al najbaroj "fiado"-maniere (kredite), bonaera slangaĵo por nomi komercajn transakciojn, kiujn oni ne pagas kontante kaj kies sukceso baziĝas sur la ligiteco inter vendisto kaj aĉetanto kaj la reciproka konfido inter ili.

Protektita institucio

Malkiel internaciaj ĉenkafejoj, kiuj estas la samaj en iu ajn lando, kie ili stariĝas, la rimarkindaj trinkejoj havas pure lokan identecon. Ili estas komunumaj spacoj de aŭtentikeco kaj aparteno, kiuj historie helpis forĝi la identecon de la urbo. La plej karakterizaj ĝuas la statuson de rimarkinda kafejo aŭ trinkejo.

Ekzistas en Bonaero Komitato pri Rimarkindaj Trinkejoj kaj Bilardejoj dependanta de la Urba Ministerio pri

© Julieta Christoflakis



“En via mirakla miksaĵo de saĝumantoj kaj memmortigemuloj, mi lernis filozofion, ludi ĵet-kubojn kaj kartojn, kaj la kruelan poezion pri ĉesigo de l’ pripenso pri mi mem.”

Fragmento de la tango *Cafetín de Buenos Aires* (Bonaera Kafejeto), 1948, de Enrique Santos Discépolo kaj Mariano Mores.

Kulturo, kiun partoprenas kaj leĝfarantoj kaj reprezentantoj de komercaj aktivecoj. Laŭ la Bonaera Urba Registaro, la *Rimarkindaj Kafejoj kaj Trinkejoj*, kiuj nuntempe nombras 77, “okupas gravan lokon en la urba kulturo. Ili posedas kaj materiajn valorojn: formalajn, ornamajn kaj praktikajn trajtojn, kaj nemateriajn valorojn, kiuj ludas gravegan rolon en la disvolvado de la urba kulturo.”

Tiu institucio, ekzameninte la proponojn de posedantoj kaj najbaroj, regule publikigas liston de tiaj kafejoj. Ĝi preskribas, ke ili fariĝu “centroj por kunsidoj, laboro, interparoloj kaj renkontoj, kie oni povu malkovri kaj pridiskuti historion”, kaj aldiras: “Ĉe ties tablo okazis kaj okazas la historio de la urbo: muzikistoj, verkistoj, artistoj kaj



politikistoj kunfandiĝas en la atmosfero de tiuj urbaj debatejoj.”

La statuso de “Rimarkinda Trinkejo” ekzistas ekde 1998 kaj “starigas la devon konservi la spiriton de la loko, la servon tie donitan, same kiel progresigi la historion kaj kulturon de la urbo”.

La plimulto de tiaj trinkejoj situas en la historia kaj financa centro de la urbo, do por tiuj, kiuj foras de tiu multe vizitata areo, enesti en la oficiala listo disponebla al turistoj konsistigas plivaloron. Krome, tiuj establenejoj povas kandidatiĝi por ricevi du tipojn de monsubteno: Por protekto de la heredaĵo kaj por disvolvado de kulturaj kaj turismaj aktivecoj.

Tango kaj literaturo

Ne estas mirige, ke referencoj pri kafejoj kaj trinkejoj abundas en la kantotekstoj de tangoj kaj en literaturo. En la kafejo *London City*, unu el tiuj situantaj ĉe la bonaera Avenuo de Majo, ekzistas tablo kun statuoj de la verkisto Julio Cortázar kun cigaro en sia mano kaj taso da kafo apud fenestro.

Temas ĝuste pri la tablo, sur kiu li verkis sian unuan romanon titolitan *La Premiitoj* (*Los Premios*) en 1960. La kafejo estas menciita en la teksto: “Estis ĉe (kafejo) London, ĉe la stratangulo de Peruo kaj Avenuo (de Majo); dek minutojn post la kvina”.

Sur tiu avenuo, kerno de la historia urbocentro kaj batanta koro de Bonaero, troviĝas la plej malnova el la ankoraŭ starantaj kafejoj: La fama kafejo *Tortoni*, fondita en 1858, unu el la grandaj katedraloj de la bonaeraj kafejoj. Konstruita laŭ franca stilo, ĝi havas plurajn salonojn de grandioza amplekso kaj atestas la bonaeran belepokon per siaj vitraloj kaj originala meblaro el marmoro kaj kverko. En 2023 ĝi celebros 165 jarojn da seninterrompa aktiveco.

“Ni klopodas por konservi ne nur la arkitekturan heredaĵon, sed ankaŭ la tradiciojn. Kelneroj, vestitaj per tradiciaj uniformoj, kantetas kaj parkerigas la mendojn, ne surpaperigas ilin. Tio estas ero de la bonaera kulturo”, diras ĝia direktoro Nicolás Prado.

Kafejo *Tortoni* estas unu el la kvar plej multe vizitataj turismaj lokoj en Bonaero.

Sur ĝiaj muroj montriĝas pentraĵoj kaj migrantaj fotoekspozicioj. Unu el tiuj fotoj estas grandega portreto de la argentina verkisto Jorge Luis Borges, kiu kutime venis por trinki kafon kaj renkonti siajn geamikojn. Lia samlandanino Eladia Blásquez estis la aŭtoro de samnoma tango dediĉita al tiu kafejo.

Inter ĝiaj muroj kunvenis multaj el la plej gravaj verkistoj de la 20-a jarcento. La pentristo Benito Quinquela Martín, naskiĝinta en la laboristklasa kvartalo La Boca, lanĉis en 1926 la kulturalan projekton *La Rondo* (*La Peña*) en la kelo de la kafejo. La pentristo priskribas sian preferatan bohemian lokon kiel “Spirita kaj sprita kelo”, kiun frekventis ankaŭ la poetino Alfonsina Storni, la komponisto

Juan de Dios Filiberto kaj centoj da aliaj eminentuloj. En la 1960-jaroj la verkisto Abelardo Castillo fondis tie la literaturan revuon *La Ora Skarabo* (*El escarabajo de oro*) kune kun la verkistino Liliana Heker kaj aliaj literaturistoj.

La kafejo *Tortoni* estas la plej priatentinda el la rimarkindaj trinkejoj, ĉar ĝi neniam fermis siajn pordojn kaj atestas la grandan transformiĝon de Bonaero, de modesta vilaĝo en grandan urbon. Ĉiujare, la 26-an de oktobro, oni celebras la *Tagon de la Rimarkindaj Trinkejoj* por rememorigi la tagon, kiam tiu kafejo estis inaŭgurita ĉe Avenuo de Majo. En 2022 oni ekokazigis ankaŭ la *Nokton de la Rimarkindaj Trinkejoj*, dum kiu ĉiuj trinkejoj estas malfermitaj kaj kelkaj



© Julieta Christofiakis

▼ Confeitería La Ideal, inaŭgurita en 1912, proponas francajn kukajojn kun orumita dekoracio.

Kafrilataj pejzaĝoj enskribitaj en la Listo de Monda Heredaĵo

En la Listo de la Monda Heredaĵo estis inkluditaj du lokoj rilataj al kafkultivado. La unua, enskribita en la jaro 2000, situas en la orienta parto de Kubo, kie la produktado de kafo dum la 19-a kaj komence de la 20-a jarcentoj estigis unikan kulturan pejzaĝon. La arkeologia pejzaĝo de la unuaj kafplantejoj en la sudoriento de Kubo bildigas la kolonian produktadon de kafo. En la loko troviĝas postrestaĵoj de malnovaj kafplantejoj sur la krutaj montdeklivoj de la valoj en la regiono de Sierra Maestra. La ŝoseoj, vojoj kaj pontoj destinitaj transporti la produkton al la merkato, same kiel individuaj plantejoj kun ties domoj, barakoj, akveduktoj, farunmueliloj, fermentigejoj kaj sekigejoj lumigas la ekonomian, socian kaj teknologian historiojn de la regiono. La postrestaĵoj inkludas la

ekipaĵon uzitan por ekstrakti la pulpon de la grajnoj necesaj por la malseka sistemo de kafproduktado.

Inkludita en 2011, la Kultura Pejzaĝo de Kafo de Kolombio spegulas centjaran tradicion de kafkultivado en malgrandaj terpecoj en alta arbaro, kaj la manieron, kiel terkulturistoj adaptis ĝin al la malfacilaj montaj kondiĉoj. La loko inkludas terkulturajn pejzaĝojn kaj urbajn centrojn sur la montflankoj de la Montaro Andoj en la okcidenta parto de la lando. La urbaj areoj karakteriziĝas per la tipa antjokia kolonia arkitekturo kun hispana influo. La kafplantejoj situas sur krutaj montaraj kun vertiĝodonaj deklivoj. La vivmaniero de la kafproduktistoj baziĝas sur la tradicia terproprietaj kaj distingiĝa produktadsistemo.

el ili prezentas spektaklon aŭ aranĝas specialan gastronomian eventon.

La plej bonaj sandviĉoj en la lando

Alia el la grandiozaj franc-stilaj kafejoj estas *Confitería La Ideal*, kie Alan Parker filmis por la muzikalo *Evita* la scenon *Valso por Eva kaj Che* (*Waltz for Eva and Che*), kun Madonna kaj Antonio Banderas kiel ĉefrolantoj. Temas pri enorma franca trinkejo, inaŭgurita en 1912 kaj antaŭnelonge remalfermita, kie ĉio okazas sub impresa orfolie orumita plafono kaj rimarkindaj vitraloj, kaj apud trinkaj-fabrikejoj kaj kvaretaĝa nutraĵproduktejo, kie la tuta preparado de la manĝoj estas farata – pan- kaj kukbakado, metiarta ĉokoladproduktado kaj preparado de la pladoj.

Pasintece, sur la unua etaĝo troviĝis la “virina areo”, kiu poste komencis esti uzata kiel tango-dancejo. Sur la muroj troveblas nigra-blankaj fotoj de geedziĝoj kaj sociaj eventoj, kiuj atestas pri la festa pasejo de la loko. Sed la ĉefa logaĵo de la kafejo estas la te-salono, kie oni prezentas tradiciajn kaj franc-stilajn kukaĵojn. “Oni diras, ke la plej bonaj sandviĉoj kun senkrustaj pantrancaĵoj en la lando venas el ĉi tie”, diras Alejandro Regne, la ĉefdirektoro.

Sed ne ĉiuj trinkejoj estas deklaritaj rimarkindaj ekskluzive pro sia valoro arĥitektura, historia kaj heredaĵa. Kelkaj ricevas tiun statuson pro tio, ke ili havas ian tradician elementon de nemateria



© Julieta Christofilakis

▼ *Kafejo Tortoni enkorpiĝas la belepokan stilon en la historia centro de Bonaero.*

kulturo. Ekzemple, la trinkejo *Bar Bar O* inaŭgurita en la sepdekaj jaroj kaj frekventita de avangardaj artistoj de la Instituto Di Tella, estas enmetita en la listo, samkiel la trinkejo *Paulín*, inaŭgurita en la okdekaj jaroj, fama pro sia bufedo, sur kiu sandviĉoj rapide glitas kvazaŭ keglaj globoj. “Kaj estas ĝuste tio, kion

la statuso de rimarkinda trinkejo provas protekti, ĉi-kaze la bufedon, la tradicion de la kelnero, kiu ĵetas al vi la sandviĉon, la malkovron de tio, ke ĉiu trinkejo havas tradicion, kiu diferencigas ĝin disde aliaj”, klarigas Emiliano Michelena, zorganto pri programado de *La Nokto de la Rimarkindaj Trinkejoj*.

La matĉo finiĝis. Argentino estas la monda ĉampiono. Laŭ tradicio en la trinkejo *El Banderín*, klientoj prenas la sifonojn antaŭe disdonitajn kaj surŝprucigas per gasakvo kelnerojn kaj turistojn rigardantajn de ekstere. Ĉe la trotuaro okazas vera festo. Tio estas moviĝanta kulturo, profunda bonaera identeco. Klientoj helpas al Luis forigi la tablojn por rapide iri al la festo apud la Obelisko, la plej grava monumento en la urbo. “Kio okazas ĉi tie, tion oni ne povas rakonti, oni devas travivi ĝin”, li diras fiere. “Ni baldaŭ centjariĝos, sed ni estas pli vivaj ol iam antaŭe”. ■

Listo de rimarkindaj trinkejoj de Bonaero troveblas ĉe <https://acortar.link/8qJnRI>

**-El la hispana esperantigis
Pablo León (Argentino)**

“Tria ejo”: Vera spaco por urbanoj

Emerita profesoro en la Departemento de Sociologio kaj Antropologio ĉe la Universitato de Okcidenta Florido en Pensakolo, Usono, kaj aŭtoro de La Bonega Ejo (The Great Good Place).

Karen Christensen

Eldonisto, eseisto kaj kunaŭtoro de publikigota, pliriĝigita eldono de La Bonega Ejo.

En la 1980-aj jaroj, la usona sociologo Ray Oldenburg disvolvis la nocion de “tria ejo”: Spaco por neformala, libera socia interagado, esenca por demokratio. La koncepto akiris neatenditan popularecon tra la jaroj. Kafejoj servas kiel perfekta ekzemplo de la tria ejo.

Sunradioj trapasas altajn fenestrojn dum vaporo leviĝas el dikaj porcelanaj kaftasoj, la bonodoro de rostitaj grajnoj kaj freŝaj gistaj bulkoj, kaj la regula fona sono de konversacioj, rido kaj tintaj tasoj. Jen la ejo kie renkontiĝas amikoj, kie najbaroj dividas novaĵojn, kie aferoj estas traktataj, kie nekonatoj ekparolas. Jen la tria ejo.

Estis la sociologo Ray Oldenburg – aŭtoro de ĉi eseo – kiu elpensis la terminon “tria ejo” en sia libro de 1989, *La Bonega Ejo (The Great Good Place)*, surpriza furorlibro, aperinta en la listo de rekomendoj de la redaktoroj de la suplemento pri libroj de *New York Times*. La tria ejo ne estas hejmo nek laborejo, sed unu el la fizikaj ejoj, kiuj tra historio kuraĝigis iun senton de varmo, amikeco, kaj tiun apartan specon de vivbezonaĵo kiun ni nomas komunumo. Tiuj kadroj inkluzivas kafejojn, tavernojn, bibliotekojn kaj frizejojn, kie homoj el diversaj medioj renkontas por umi en neformala etoso.

La termino “tria ejo” eniris la komunan vortaron. La admirantoj de Ray Oldenburg tra la mondo konsideris lian libron por trovi manierojn por antaŭenigi socian koherecon fasonante fizikajn spacojn, kiuj antaŭenigas senton de komunumo. Legantoj diris ke la libro donis nomon al io, kion ili konis kaj prizorgis, nehavante manieron por preparoli ĝin.

Ĉi tiu simpla koncepto memorigas al ni, ke la homaj kunligoj bezonas esti nutrataj kaj ke komunumo dependas de tiaj simplaj aferoj kiel kelkaj tabloj, amika gastiganto kaj la volo vidi kio okazas kiam ni renkontas vid-al-vid.

Kiam ekis la amasfermiĝoj pro KOVIM-19, bostona ĵurnalisto demandis, ĉu ni pensis, ke la triaj ejoj iam revenus. Ni respondis per emfaza “Jes!”: Ni sciis ke la Zoom-renkontiĝoj kaj aperitivaj horoj neniam anstataŭus vid-al-vidan interagadon.

Nenio kontribuas tiom multe al sento de aparteneco en iu komunumo kiel membreco en tria ejo. Sed multaj ejoj reklamitaj kiel triaj ejoj ne plenumas la kondiĉojn. Estante valoraj publikaj ejoj – tiaj kiaj stratbazaroj kaj piedirantaj butikaj stratoj – ili ne estas la formo de ejoj kiujn Oldenburg havis en la menso.



La tria ejo, kutime, estas trinkejo de iu aŭ alia speco, kaj konversacio estas la ĉefa aktiveco. La ĝenerala regulo estas, ke trinkaĵoj estu tiel gravaj, ke ili fariĝu veraj sociaj sakramentoj. Efektive, la plimulto el la triaj ejoj de la mondo ĉerpis sian identecon el la trinkaĵoj kiujn ili servis. Estas aŭ estis eldomoj, teo-domoj, gastrinkaj fontanoj, vin-trinkejoj kaj lakto-trinkejoj. Bierĝardenoj en Germanio, ĝin-palacoj en Anglio, 3.2-ejoj en Usono ktp. La ĉeĥa *kavama*, la germana *kaffeeklatsch* (kafbabilejo), la franca *café* (kafejo) – ĉiuj devenas de la respektivaj vortoj por kafo.

Feto de demokratio

La kafejoj ekis en Mezoriento, kaj ilia glortempo kiel tria ejo estis en Anglio dum la 17-a jarcento. Kafo estis konsiderata kiel danĝera kiam oni unue enkondukis ĝin en Eŭropon, dum kafejo fariĝis la preferata ejo por politikaj debatoj. En 1560, entreprenisto konata nur kiel Jakobo malfermis la unuan kafejon en Oksfordo.

lom poste, aliaj estis malfermitaj en Kembriĝo kaj Londono. La kafejo kaj ĝia "amara, nigra trinkaĵo" estis komence konsiderata kiel novaĵo – sed ne longtempe. La demokrata etoso de la kafejo, ĝiaj same demokrataj prezoj, kaj la agrabla kontrasto kiun ĝi prezentis kun la ebriemo, kiu afliktis la gastejojn kaj tavernojn de la 17-a jarcento, rapide donis al ĝi popularecon.

Kiam la Reĝo Karlo la Dua provis subpremi la kafejojn en 1675, estis tiom forta protesto, ke li retiris la edikton dek tagojn poste. Kiel ejoj de libera parolado permesantaj ian nivelon de egaleco, kafejoj povas esti konsiderataj kiel prauloj de demokratio.

Kafo spronas la intelekton; alkoholo la emocion kaj dormemon. Tiuj kiuj trinkas kafon estas kontentaj penseme aŭskulti muzikon, dum tiuj kiuj trinkas alkoholon emas fari sian propran muzikon. Danco estas ĝenerale ligita al konsumado de alkoholaĵoj, sed tute ne al sorbado de kafo. Legaĵoj estas ĝenerale digestitaj en la kafejoj de la mondo, sed ne en trinkejoj. La sagojetanto trinkas elon, sed la trinkaĵo de la ŝakludanto estas kafo.



La nocio de "tria ejo" memorigas nin, ke homaj ligoj bezonas nutradon.

“Universitato Penco”

En Anglio, la kafejoj estis ofte konataj kiel la “Universitato Penco”. La penco estis la enirprezo al ĝia stoko de literaturaj kaj intelektaj gustoj. Du pencoj estis la prezo de taso da kafo; pipo kostis unu pencon; gazeto estis senkosta. La kafejo de la 17-a jarcento estis antaŭulo de la tagjurnalo kaj livero de poŝtajoj hejmen, kaj la centro de komerco kaj kultura vivo, samkiel politikumejo.

Multaj el la plej grandaj komercaj kompanioj de la lando havis sian ĉefsidejon en kafejo, kaj la borsagentoj de Londono laboris ene de ili dum pli ol cent jaroj. La agentoj fine akiris sian propran lokon kaj establis borson nur kiam tiuj kafejoj malkreskiĝis. La asekurinstytucio Lloyd’s of London funkciis dum pluraj jaroj en kafejo, kiu liveris lokon por ke la neorganizitaj primaraj asekuristoj de la urbo povu intermiksiĝi kun homoj spertaj pri la maro kaj profiti ilian klaĉadon. La kafejo esence estis forumo por homa asociado kaj komunumo, kaj praktikaj kaj profunde kontentigaj.

Novaj perspektivoj

Oni apenaŭ povus diri, ke la bezono de tia societo malaperis. Dum viglaj triaj ejoj ja maloftiĝis, eblas nomi faktorojn kiuj permesas al ili supervivi kaj prosperi. Etoso gravas, kiel ankaŭ loko kaj perspektivo. La franca kulturo, ekzemple, konservis homfaritan medion, kiu estas estetike agrabla kaj farita laŭ homa skalo. Tra la modernaj tempoj, la deziro konservi la vivon de la strato triumfis. Eĉ en Parizo, kie veturiloj estas ĉie, la vivo de la strato kaj de la kafejoj (bistro) daŭras flank-ĉe-flanke.

Alia ekzemplo estas la viena kafejo, modelo de la tria ejo. Krom la malluma periodo sub la nazioj (kiuj favoris bierejojn, sed timis kafejojn), la kafejoj de Vieno neniam vere malkreskis en



La kafejo de la 17-a jarcento estis vera politikumejo kaj loko por legi gazetojn

viveco kaj populareco. Ĉi tiu priskribo de gvidlibro de 1931, *La Vieno kiu ne estas en Baedeker*, de T. W. MacCallum povus esti modelo por la speco de kafejo, kiun ni bezonas hodiaŭ:

“La ejo por ĉiuj, renkontiĝejo por geamantoj, klubo por homoj de komunaj emoj aŭ intereso, oficejo por la kelkfoja komercisto, ripozejo por la revulo, kaj hejmo por multaj solecaj animoj”.


La meteora kresko de ĉenposedataj kaj markitaj kafejoj, kiuj ekis en la fruaj 1990-aj jaroj, estis parte bazitaj sur la ideo de amika, vivdonanta sperto de tria ejo. Portebla teknologio samkiel la pandemio, tamen, draste ŝanĝis la komercan modelon. 80-kelk procentoj de la ĉenaj kafejoj nun ofertas traveturajn kaj portebajn mendojn. La asertoj ke ili povas transformi poŝtelefonan aplikojn en virtualan trian ejon renkontis konsiderindan skeptikismon.

Ĉi tio malfermas novajn eblecojn por loko posedataj kafejoj, samkiel por aliaj komercoj kun tria eja potencialo.

Estas tempo por revigligi la trian ejon por diskutado, debatado, kamaradeco kaj ridado. Ni bezonas vidi niajn amikojn kaj najbarojn kaj esti ĉirkaŭ homoj kiujn ni ne konas. La tria ejo estas en la mezo de nia serĉado pri pli bona vivmaniero. ■

-El la angla esperantigis Trefflé Mercier (Kanado)

* Ray Oldenburg, aŭtoro de ĉi-artikolo, forpasis la 21an de novembro 2022, kelkajn monatojn antaŭ ĝia publikigo en UNESKO-Kuriero.



Turka kafo, ne nur trinkaĵo sed kulturo

Depost la enkonduko en la Otomanan Imperion en la 16-a jarcento, la turka kafo iom post iom ricevis centran lokon en la sociaj ritoj. Spite al la svarmo de kafejoj de la grandaj okcidentaj ĉenoj en Istanbul, la turka kafo plu forte staras, aparte inter la gejunuloj.



© Shutterstock / franzi12

▼ Kuirado de turka kafo en tradiciaj cezve-kafpotoj

Grandaj amasoj trairas la kolorajn budojn en Eminonu dum la voĉoj de vendistoj plenigas la aeron en tiu malnova kvartalo ĉe la suda marĝeno de la Ora Korno. Estas facile trovi la turkan kafejon *Kuru Kahveci Mehmet Efendi* pro la longa vico, kiu formiĝas ekstere. Aŭ oni povas simple sekvi la fortan odoron, kiu plenigas la aeron kiam oni eliros el la pitoreska Granda Bazaro de Istanbul. En la vico troviĝas ankaŭ 50-jara Guldane Aktas, kiu trinkas du tasojn da turka kafo ĉiutage. La unika odoro de rostitaj kafograjnoj levas ŝian humoron kaj portas rideton al ŝia vizaĝo. "Valoras atendi en la vico. La kafo estas tre freŝa," ŝi diras. "Kiam mi venas al Eminonu, mi ne foriras sen akiri mian pakajon da turka kafo." "Turka kafo estas

forta, sed ne gravas. Ni ŝatas ĝian guston," diras la siria rifuĝintino Safiye, atendanta en la vico kune kun sia edzo. Cenk Girginol, la aŭtoro de *Kafo: de la grundo al la taso* (*Coffee: from the Soil to the Cup*), priskribas la turkan kafon kiel kulturon, ĉar ĝi neniam ekzistis nur kiel trinkaĵo. Laŭ fama turka proverbo, kaftaso povas krei amikecon, kiu daŭras 40 jarojn. La kulturo kaj tradicio de turka kafo estis aldonitaj al la Listo de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj de UNESKO en 2013 (rigardu la skatolon sur paĝo 16).

Salita kafo por la fianĉo

En la pasinteco, turka kafo estis integra parto de socia vivo en kvartalaj kafejoj. En Anatolio ĝi rolis en la solvado de

disputoj: kiam du viroj malpacigis en la vilaĝo, oni servis al ili amikecan kafon por malfermi dialogon kaj fini ilian rankoron. Nuntempe ĝi havas signifan rolon en geedziĝaj ritoj: Kiam la familio de la fianĉo vizitas la hejmon de la fianĉino antaŭ la geedziĝo, oni atendas, ke la fianĉino faru perfektan turkan kafon. Antaŭe, tio estis la sola okazo por ke la estontaj fianĉino kaj fianĉo renkontiĝu. Se la fianĉino ŝatis la kandidatan fianĉon, ŝi tiam preparos kafon kun sukero, sed se ŝi ne ŝatis lin, ŝi anstataŭe aldonos salon. Nuntempe paradokse iuj estontaj fianĉinoj servas salitan kafon al la fianĉo dum tiu rito por taksii la grandecon de lia amo. Se li ŝatas la junulinon, li trinkos la salitan kafon anstataŭ elsputi ĝin. "Kafo ĉiam estis uzita kiel preteksto por komenci konversacion," diras Cenk Girginol. Kafo havas ĉefan rolon en la ĉiutaga vivo, ĉu en la formo de "matenkafo" (*sabah kahvesi*), "plezur-kafo" (*keyif kahvesi*) aŭ "laco-kafo" (*yorgunluk kahvesi*). La preparado mem estas ceremonio. Ĉio, kion oni bezonas, estas malgranda poto kun longa tenilo, nomata *cezve* kaj malgranda kaftaso nomata *fincan*, kun subtaso. Kiam la kafo ekbolas, ŝaŭmo venas al la supro. Tiu ŝaŭmo estas distinga trajto de bona turka kafo, kiu estas servata kune kun akvoglaso kaj turkaj frandaĵoj. "Ekzistas ankaŭ rito legi la kafpulvoron," aldonas Girginol. La pulvoro restanta en la malplena taso estas ofte uzata por konigi la sorton de la trinkinto. Antaŭdiri la sorton inter geamikoj aŭ konsulti profesiajn sortodirantojn estas populara tempopasigilo. Estas eĉ aplikaĵoj, kiel Faladdin, kiuj post sekundoj liveras komentojn pri sendita bildo de malplena taso.



La kulturo de turka kafo agnoskita kiel nemateria kultura heredaĵo

La kulturo kaj tradicio de la turka kafo estis aldonitaj en la Listo de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj de UNESKO en 2013: Oni agnoskis la unikajn manierojn laŭ kiuj la kafo estas preparita kaj kuirita, same kiel la riĉaj komunumaj tradicioj, grava parto de la turka kultura heredaĵo. La turka kafo estas preparata per la ĵus rostitaj kaj maldike muelitaj kafgrajnoj. Tiam kafopulvoro, malvarma akvo kaj sukero estas aldonataj al kafpoto kaj malrapide kuirataj por produkti la deziratan ŝaŭmon. La trinkaĵo serviĝas en malgrandaj tasoj kaj estas trinkata ĉefe en kafejoj. Tiu tradicio entenas ĉiujn sferojn de la vivo. Prifestata en la literaturo kaj en kanzonoj, la turka kafo estas simbolo de amikeco, gastamo kaj rafiniteco. Ĝi ludas ŝlosilan rolon en sociaj okazaĵoj, kiel en fianĉiĝaj ceremonioj kaj ferioj.



En Anatolio, kiam du viroj malpaciĝis, oni servis al ili amikecan kafon por fini la disputon.

Rostado kaj muelado

La historio de turka kafo datumas de la 16-a jarcento, dum la regado de la otomana Sultano Suleimano la Grandioza. Laŭ legendo, otomana guberniestro, kiu instaligis en Jemeno, ekamis kafon kaj enkondukis ĝin en la palacan kuirejon.

“La unua kafejo malfermiĝis en Istanbul en 1554,” rakontas Girginol. Li klarigas, ke dum la Sieĝo de Vieno en 1683, la otomanaj trupoj forlasis kaf-sakojn post malsukcesa provo kapti la urbon. Tio enkondukis la kafon en Eŭropo. “Ĝia populareco rapide disvastiĝis inter aliaj landoj.”

“Kiam kafgrajnoj alvenis en la otomanaj landoj, ili estis rostitaj, muelitaj kaj kuiritaj por ekhavi unikan guston. Nun ni ĉiuj ĝuas trinki kafon danke al la turkoj, kiuj kreis novan teknikon en la 16-a jarcento,” asertas Gizem Salcigil White, turkan-usona entreprenisto kun kromnomo “Turka Kafulino”. “Post kvin jarcentoj, tiu ĉi antikva kafpoto *cezve* plu estas uzata en Turkio kaj ankaŭ en pluraj balkanaj kaj mezorientaj landoj”, ŝi aldonas.

White travojaĝas la mondon per kamiono de premiita turka kafo de post 2012 por diskonigi pri la kulturo de turka kafo en Usono kaj alilande. “Turka kafo” ne signifas kafon produktitan en Turkio, laŭ Osman Serim, ano de la Asocio de Esplorado pri la Kulturo de Turka Kafo. Laŭ li, pli grava ol la botanika specio estas la metodo prepari la kafon: la tempo de rostado – meze rostita – kaj pulvorigo. Por turka kafo, la grajnoj estas muelitaj eĉ pli maldike ol en la itala espreso, diras Serim. “Tio ebligas la servadon de la kafo kun la pulvoro. La pulvoro ne eniras la buŝon.” Kiel ĉie, okcidentaj kafej-ĉenoj disvastiĝis en Turkio en la lastaj jaroj. Tamen Cenk Girginol havas pozitivan rigardon, ke malgraŭ la populareco de la eksterlandaj markoj, la loka kaf-kulturo superregos. Osman Serim samopinias: “La turka kafo ne riskas malaperon. Male, ĝi fariĝas tre populara, aparte inter gejunuloj.” ■

**-El la angla esperantigis
James Rezende Piton (Brazilo)**

© Shutterstock / Istanbulphotos



► Surstrata kafejo en Istanbul, ĉ. 1900

Tsinari, postrestaĵo de la otomana pasinteco de Tesaloniko

Unu el la lastaj otoman-stilaj kafejoj troviĝas en la supra parto de la urbo Tesaloniko en Grekio. Malgraŭ tio, ke la internaĵo restis preskaŭ neŝanĝita, multe da tempo pasis ekde kiam ĝia posedanto estis barbiro kaj foje ankaŭ dentisto. Ankaŭ virinoj nuntempe estas bonvenaj al *Tsinari*, kaj multaj turistoj alvenas tien por foti antaŭ tiu ejo, kie troviĝas multaj spuroj de antikveco.

La ĉiutaga realeco de otomana Tesaloniko (1430-1912) postlasis nur malmultajn konkretajn spurojn. Rara spuro de la tiutempa ĉiutaga vivo troveblas en la kafejo *Tsinari*, kiu situas en la supra parto de la urbo, ĉe la stratangulo de la stratoj Klious kaj Alexandras Papadopoulo.

Ĝia unua posedanto, en 1885, estis islama turko kies nomo, Köse, signifas "la senbarbulon". La kafejo de Köse estis hela kvarangula konstruaĵo, kies fasado konsistis preskaŭ tute el fenestroj. La du grandaj fenestroj je unu flanko sin direktas

al ombrita, iom pli alta teraso, formita de dekliva grundo, kaj je la alia flanko al la strato. Granda gisfera forno en la centro de la ĉambro distribuis komfortan varmon dumvintre. Vid-al-vide, trans la strato, malnova puto, onidire el la tempo de sultano Murad la Dua (1404-1451), la konkerinto de Tesaloniko, estis renkontejo por la najbaraj loĝantoj. Ĝi donis al la kafejo ne nur akvon, sed ankaŭ venigis kelkajn klientojn.

La platanoj, laŭ kiuj la kafejo kaj la tuta ĉirkaŭaĵo estas nomataj, restas mistero.

Fakte, *Tsinari* estas la helena formo de la turka vorto *çınar*, kiu signifas platanon. Kelkaj arboj ombras la etan stratangulon ĉe la kafejo, sed ili ne estas platanoj. Fotoj el la frua 20-a jarcento montras neniun platanon. Supozeble tiuj ekzistis tie antaŭ longe, dise troviĝantaj kaj postlasintaj spurojn en la loka toponimio ĝis hodiaŭ.

Kafejposedanto kaj barbiro

En la tempo de Köse, la plejmulto de loĝantoj estis islamanoj. Kelkaj estis



▶ La malnova puto, kiu alfrontas la kafejon *Tsinari*, estis renkontejo por la najbaraj enloĝantoj. Ĝi donis al la kafejo ne nur akvon, sed ankaŭ venigis kelkajn klientojn.



©Sergios Karavatos

▼ La internaĵo de la kafejo Tsinari ne multe ŝanĝiĝis ekde 1885.

civilaj dungitoj kaj laboris ĉe la proksima provinca administrejo. Eĉ en tiuj kleraj grupoj, libroj kaj gazetoj malofte troviĝis en privataj domoj. Fine de la 19-a jarcento, stimulita de abunda gazetaro, la modo de *kiraathane* (legadĉambroj) estis ĉe sia pinto. Ĉu probable la grandaj vitrofasadoj estis tie por faciligi la interhomajn aŭ interkolektivajn kontaktojn kun la skribinta vorto, tiel kombinantaj la funkciojn de legoĉambro kaj kafejo? Ĉi tiu hipotezo ĉiel-ajn ŝajnas esti pli evidenta, ĉar la kafejo estis plurcela loko. La kafejposedanto estis ankaŭ barbiro, kiu kelkfoje agis kiel dentisto. Ankaŭ nuboj de tabako estis parto de la dekoracio kaj akompanis la trinkaĵojn, akorde kun la malnova greka proverbo, laŭ kiu “kafejo sen cigaredo estas kiel brakumo sen kiso”. En la kafejo *Tsinari*, laŭŝajne, ne estis la posedanto, kiu zorgis pri la barboj aŭ harartondado de la klientoj, sed iu nomata Ismael, kies ekipaĵo okupis angulon de la ĉambro.

Almenaŭ ĝis la fino de la otomana periodo, nur viroj estis priservataj en najbaraj manĝejoj kaj trinkejoj. Oni ne certas pri tio kiam virinoj ekfrekventis ilin. La virinoj inventis siajn proprajn formojn de societemo en siaj hejmoj. La kunvenoj por aŭguradi el kafaj fundajoj estis faritaj hejme, inter virinoj, kaj estis same sukcesaj kiel la *nargileo* (akvopipo) aŭ la ludo triktrako, kiuj estis ĉefe por viroj.

Mezės, raki kaj muziko

Ekde la 1920-aj jaroj, la socia topografio de la najbareco ege ŝanĝiĝis. En la kunteksto de la interŝanĝo de populacioj de Grekio kaj Turkio en 1923, la islamanoj foriris. La supra urboparto estis tuj okupata de helen-ortodoksaj rifuĝintoj, kiuj amase

alvenis el Anatolio. La vastaj domoj, ofte ĉirkaŭitaj de grandaj ĝardenoj, estis uzataj kiel provizoraj loĝejoj, kie kelkaj familioj estis amasiĝintaj. Kombine kun ekstrema malriĉeco, la senradikiĝo provokis daŭran kaj transgeneracian amarecon, miksitajn kun nostalgio.

La posedantoj de la kafejo *Tsinari* ŝanĝiĝis. Laŭ disponeblaj dokumentoj la nova posedanto devenis de Smirno, kaj kune kun la kafo, li ofertis *mezės* (etajn porciojn de manĝaĵoj) kaj *raki*, tradician alkoholaĵon, aromitan per anizo. Ankaŭ muzikistojn kaj politikajn renkontiĝojn li gastigis sur sia teraso. La tempo, kiam *Tsinari* estis pacema loko, kuraĝiganta kvietecon kaj mediton, ĉesis. Trafita de profunda ekonomia krizo, Grekio inter la du mondmilitoj devis esprimadi sian malbonsenton kaj redefini sin mem. Kiel multaj aliaj tiutempaj kafejoj, *Tsinari* akompanis tiun procezon per eĥado de la tumultoj de politika malstabileco.

Post la 1920-aj jaroj, la tiea identeco ne draste pluŝanĝiĝis. Rifuĝintoj el Malgrand-Azio restis en la areo dum kelkaj jardekoj. Enmigrintoj el la eksa Sovet-Unio, alvenintaj pro ekonomiaj kialoj, setlis tie en la 1990-aj jaroj. La malriĉeco, kiu iĝis endemio, postlasis spurojn en la loka

lingvo. En la slango de la 1970-aj jaroj en Tesaloniko, “tsinari” estas persono, kies klopodoj por doni la impreson esti “bone vestita” rezultigas ekstravagancon de malbona gusto. Kvankam eksmoda, la plej proksima ekvalento estas la parolturno en kelkaj lingvoj: “vestita kiel birdotimigilo”.

Tempo haltis

La nuntempa *Tsinari* estas sintezo de siaj 137 jaroj da aktiveco. Kafo estas ankoraŭ ofertata, sed ankaŭ manĝaĵoj kaj alkoholaĵoj haveblas. En la klientaro nun troviĝas ankaŭ multaj junuloj kaj virinoj. La familio tenanta la kafejon ekde 1990 konscias pri ĝia signifo kiel heredaĵo de Tesaloniko. Nek la konstruaĵo, nek ĝia uzado povas esti ŝanĝata. Ĉiun jaron, la posedanto reinstalas la grandan lignan fornon, kiun oni formetas dum la someraj monatoj. La muroj estas kovritaj per paliĝintaj fotoj kaj objektoj, kiuj ebligas al ni vidi kaj imagi la historion de la ejo.

Ne plu fluas akvo en la puto antaŭ la kafejo, sed la najbaraj katoj pozas por vizitantoj, kiuj fotas la konstruaĵon, kun ĝia gablo, pruntita el iu romia-bizanca monumento, ĝiaj otomanaj brikoj kaj la rompita baseno, dekoraciita per helena surskribo. Se ni ignoras la aŭtojn, kiuj ĉi tie sin turnas al la supra urboparto, ni povus imagi esti sur la teraso de la kafejo Köse 130 jarojn antaŭe. Probable estas pro la sperto de ĉi tiu iluzio de haltinta tempo, ke turkaj turistoj vizitas Tesalonikon. La loko konservis la senton de otomana urbo. Sendube la kafejo *Tsinari* estas ĝia plej aŭtentika postrestaĵo. ■

-El la angla esperantigis Frank Lappe (Germanio)



Kiel multaj aliaj kafejoj de la 1920-aj jaroj, Tsinari eĥis la tumultojn de politika malstabileco

Etiopio, la hejmlando de kafo

Legendo rakontas, ke en antikveco iu abisena paŝtisto malkovris la stimulaĵajn efikojn de kafo. Laŭ la historio, komence nur islamanoj rajtis trinki ĝin, sed poste la trinkaĵo disvastiĝis tra aliaj sociaj rondoj. Hodiaŭ, kafo estas ĉie en la ĉiutaga vivo de etiopoj kaj oni jam havas tradician ceremonion kafumi en festotagoj.



▼ Kafejo en Adis-Abebo

Nun kafo estas unu el la gravaj elementoj de ĉiutaga vivo de etiopoj. Ĝi ludas gravan rolon en kreado de amika etoso kaj bonaj sociaj rilatoj, estas malaltkosta kaj liverata ĉien en ajna okazo. En la ĉefurbo, Adis-Abebo, kiel en ceteraj aliaj urboj de la lando, oni povas trinki kafon ie ajn – ekzemple, surstrate kaj surtrotuare, sidante sur eta seĝo kaj interŝanĝante la najbarajn novaĵojn. Komprenible, vi ankaŭ povas trovi ĝin en luksaj internaciaj hoteloj kaj flughavenoj, kie la prepara rito estas farita sur malgranda scenejo.

Dum festotagoj okazas kaf-ceremonioj en ĉiuj hejmoj kaj tiam eleganta ritmaniero, vestaĵoj kaj iloj por kafumado estas nedisigeblaj partoj de la ceremonio. Tiam dommastrinoj montras siajn kapablojn kaj junulinoj havas ŝancon esti rimarkataj de aliaj. La stratoj kaj vilaĝoj estas plenaj de la bonodora fumo de rostita kafo, miksit kun laodoro de incenso. Oni supozas, ke kafo estas tiel nerezistebla, ke ĝi allogas nevideblajn spiritojn, kiuj estas kvietigitaj de la purigaj virtoj de la incenso. Por bonvenigi gastojn, oni disjetas sur la tero freŝajn herbojn kaj florojn. Parencoj, najbaroj kaj amikoj vizitas unu la alian, kunportante sakojn da sukero kaj spicoj, kiuj povas esti aldonitaj al la trinkaĵo. Rostitaj grajnoj aŭ salita pufmaizo estas liverataj kiel malpeza manĝaĵo.

Sinsekvaj tri servoj

La unua ago de la ceremonio estas tio, ke ĉiuj gastoj flaretas per moveto de la mano direkte al siaj naztruoj la fumon de rostitaj kafgrajnoj. La kafujo, nomata *djebena*, rondeta kaj longkola, farita el terakoto, estas plenigita je akvo kaj surmetita sur la fajron. Dum tiu ĉi tempo la grajnoj estas muelitaj en pistujo. Poste oni kolektas la muelajojn en la manplato, kaj verŝas en la kaffarejon por denove boligi kelkajn sekundojn. En la altebenaĵoj de Etiopio, 2 500 metrojn super la marnivelo, akvo bolas je 91°C, la ideala temperaturo por konservi ĉiujn aromojn.



La kafa ceremonio, kiu fariĝis simbolo de la etiopa vivmaniero, havas sian originon en Sufismo

Kiam la nigra trinkaĵo estas preta, oni verŝas ĝin, iom de supre ne ŝprucigante ajnan guton, en malgrandajn kaj sentenilajn tasojn surmetitajn sur malalta tablo kiun oni aparte pretigis por la ceremonio. La unuaj tasoj da kafo estas disdonitaj al la plej maljunaj kaj estimindaj homoj inter la gastoj. Por plibonigi la guston, sukero povas esti aldonita, aŭ pinĉo da salo, precipe en kamparo, kie sukero estas malabunda kaj multekosta. Multaj homoj ŝatas aldoni ankaŭ branĉeton de la aroma planto *tenadam* (la sano de Adamo). Post ĉi tiu unua servo, oni denove enverŝas akvon en kafboligilon je ĝia grunda parto kaj ekboligas ĝin por la dua servo. Fine, post kelkaj horoj, la ceremonio finiĝas per la tria gustumo de la kafo.

La supre menciitajn tri partojn de la ceremonio oni nomas per vortoj de la araba lingvo: *abol*, *tona* kaj *baraka*, respektive kun la signifo la unua, la dua kaj beno. Ĝi memorigas al ni spurojn de la pasinta religia tempo. Ĝis la fino de la 19-a jarcento, nur islamanoj trinkis kafon, kiu estis malpermesita al kristanaj etiopoj. Geografia limo de Etiopio tiam ne estis kiel la nuna. Tiam la kristana komunumo situis ĉefe en la montara regiono, kaj de tempo al tempo ili sin disetendis direkte al la malaltaj ebenaĵoj aneksante teritoriojn regitajn de islamaj aŭtoritatoj, por gardi sin kontraŭ eŭropa kolonia ekspansio.

Ekonomia kaj politika afero

En tiu ĉi kunteksto formiĝis nuna moderna Etiopio, kaj kafo ludis duoblan rolon en ĝi. Unuflanke, politika sendependeco devus esti garantiita je ekonomia prospero per disvolviĝo de eksportado. La kafoplanto kreskas bone en Etiopio – la origina loko de tiu planto. Aliflanke, estis necese unuigi dividitan nacion. Per malkaŝa trinkado de kafo, la reĝo Menelik, kiu regis la landon de 1889 ĝis 1913, instigis kristanojn imiti lin, ne nur por stimuli la enlandan merkaton (hodiaŭ, 40% de la kafproduktado de Etiopio estas konsumita enlande), sed ankaŭ por konstrui sian landon komunan kaj paceman.

La kafceremonio, kiu fariĝis simbolo de la etiopa vivmaniero, havas sian originon en sufia islama mistikismo. Eĉ hodiaŭ, ĉe kunvenoj de sufoj, kafo plurfoje aperas dum la ritoj. La pladoj uzitaj por kuirado, la kafkruĉo, la incensujo ktp. estas konsiderataj kiel portantoj de spirita povo, indikita per la koncepto de *baraka* (gracio). La gracia pliiĝas dum la servado de kafceremonio kaj fortiĝas per la vortoj de la ritgvidanto. Ili estas aŭtentikaj poeziaj improvizoj, kiuj trapenetras la trinkaĵon kaj absorbas ĉiujn partoprenantojn por pli firmigi la ligojn de amikeco kaj frateco inter ili.

Konflikto pri la efikoj de qahwa

Tiu ĉi ritceremonio pro kafo devenas de la 15-a jarcento p.K. La kafo kreskas en la montaj arbaroj en suda Etiopio, kaj estis malkovrita kaj disvastigita en Jemeno. La nova substanco kiu efikas vekon de ĝojo unue estis uzita inter la membroj de la Sufi-frataro Shaziliya, fondita en la 13-a jarcento en Tunizio, kaj poste en Egiptio. Malkovrinte en la kafo bonegan stimulilon por siaj spirita praktikoj, ili komencis instigi ĝian uzon.

Tamen, dum la unuaj jardekoj de disvastiĝado de kafo en la araba duoninsulo, Egiptio, Turkio kaj ĉie en la otomana imperio, aperis konflikto pri la uzado de kafo. Kelkaj teologoj tiam kredis, ke la ekscito kiu donas *qahwa* (edifiga spirito) estas simila al la ekscito pro vino, kiu estas malpermesata en Islamo.

La aŭtoritatoj ankaŭ suspektis pri komuna kaftrinkado, kie ĉiuj estis liberaj esprimi siajn opiniojn. Tamen, la pozitiva efiko de kafo sur la bonfarto de homo, precipe ĝia kapablo stimuli mensan agadon, determinis ĝian sukceson, kiun neniu konservativa opinio povus malhelpi. En la 17-a jarcento, kafo komencis rapide

La naskoloko de sovaĝa kafo

En 2010, la kafa zono en Etiopio enlistiĝis kiel monda biosfera rezervejo de UNESKO. La biodiverseca centro situas je 460 kilometroj sudokcidente de la landa ĉefurb Adis-Abebo. Tie estas la naskoloko de ĉirkaŭ 5 000 sovaĝaj arabaj kafoj.



© Nadia Ferroukhi

▼ Junaj virinoj preparas kafon en korto en antaŭurbo de Adis-Abebo.

“

En 15-a jarcento en Arabio, la aŭtoritatoj suspektis je kaftrinkado, tiam kiam ĉiuj estis liberaj esprimi siajn opiniojn.

populariĝi en Eŭropo, kiel la plej grava faktoro en la formado de moderna socio.

La historio de la origino de kafo estas rakontita en konata legendo: Unu etiopa paŝtisto rimarkis, ke meznokte grego da kaproj (aŭ kameloj, laŭ alia versio) estas en stranga ekscitita stato. La konfuzita paŝtisto rakontis pri tio al la ĉefreligiulo, kiu tuj esploris la situacion kaj alvenis al la konkludo, ke la kialo de ĉi tiu konduto de bestoj estas arbusto kun ruĝaj beroj. Li testis la efikon de la planto je si mem,

preparante tinkturon enhavantan ĝian aktivan substancon. Kuraĝigite de ĉi tiu malkovro, li instigis siajn religiajn fratojn sekvi lian ekzemplon, por ke, konservante viglecon, ili fervore preĝu ĝis malfrua nokto.

Ekde la publikigo en Eŭropo en 1671 de la unua traktato pri kafo, verkita de Faust Nyron, diplomatiĝinta en la kolegio de Maronitoj en Romo, ĉi tiu legendo pri kafo kaj kaproj multfoje aperis en diversaj versioj, kaj ĝiaj bildoj fariĝis

parto de la simbolo de multaj kafamantoj tra la mondo. Ĉi tiu legendo samtempe reflektas la proksimecon de la kaftrinkado al la homoj, ĝian religian aspekton, kaj ĝian rolon kiel katalizilo por scienca esplorado. ■

-El la angla esperantigis Chimedtseren Enkhee (Mongolio)

Eta lukso renkontas egan sukceson en Korea Respubliko

La Korea Respubliko fariĝis la tria plej granda kafbutika merkato en la mondo en nur jardeko, kun vera furoro pri “instagrameblaj” kafejoj. Oni komence supozis, ke la kreskanta postulo rezultas de la rapida vivstilo en la urboj de la lando kaj la influo de internaciaj kafĉenoj, sed fakte estis populara televidserio kiu ekigis la tendencon.

Por iu, kiu asertas ne esti “tre kafumema homo”, 32-jaraĝa Hyunjae Lee, oficej-laboristo, foruzas grandan parton de sia tempo kaj semajna buĝeto en la multnombraj seculaj kafejoj. Malgraŭ la altiĝo de vivokosto, ŝia semajna elspezo pri espresso-bazitaj trinkaĵoj superas 30 usonajn dolarojn.

Ŝi bezonis dek tagojn por mendi la plej serĉatajn sidlokojn ĉe luksa kafejo en Seulo. Tute meblita per orumitaj tabloj kaj vazarkompleto, la ŝpruc-kafejo lanĉita de brita modbutiko estas furoranta en Instagram, kun rezervoj menditaj perinterrete ene de sekundoj post malfermo.

Lakto estas unu el la plej bonprezaj elektebloj en la menuo, kontraŭ 7.50 usonaj dolaroj, pli kosta ol la hora minimuma salajro. La ŝaŭma trinkaĵo ne gustis rimarkinde pli bone ol averaĝa ekvivalento kiu kostus al Lee trionon de la prezo pagita. Sed ŝi diras, ke ĝi ja valoris la pitoreskan sperton.

Samkiel Hyunjae Lee, multaj koreoj ŝparas neniun monon kiam ili venas trinki esprimon kun amikoj. La loĝantoj de la Korea Respubliko elspezas averaĝe 75 usonajn dolarojn por kafo ĉiumonate, laŭ novembra enketo de Korea Nacia Konsilio de Konsumantaj Organizaĵoj. En 2021, hejmoj elspezis trioble pli por kafo ol por kimĉio, la ikono de la nacia bazmanĝaĵo.

“Vi iras al kafejo kun kolegoj post tagmanĝo aŭ por renkonti amikojn dum la semajno. Sed mi ankaŭ serĉas kafejojn ekster la urbo por trinki trankvile,”

diras Max Kim, 32-jaraĝa fakulo pri amaskomunikado.

Espresso-ekspansio

La konsumado de kafo pliiĝis konstante en la Korea Respubliko ekde la komenco de la 21-a jarcento, sed dum la lastaj jaroj okazis eksterordinara kresko. Tipa plenkreskulo trinkis pli ol 353 tasojn jare en 2018, je 60 pli ol en 2015, kaj trioble de la monda averaĝo, laŭ Hyundai-a Esplora Instituto (HEI).

Dum la tendenco plejparte estis atribuita al vivstilo kaj la longaj, intensaj

horoj da laboro kaj studo, la neestingebla soifo je kafo ne estas tiel simpla kiel kutima konsumo de kafeino.

La postulo estis pelita de “demografia ŝanĝo kun la pliiĝo de jarmiluloj kaj ‘Z-generaciuloj’”, laŭ Yong-jin Kim, profesoro ĉe Sogang-a Komerca Lernejo. “Junuloj frekventas kafejojn ne nur por la trinkaĵo, sed ankaŭ por la loko,” li diras.

Konsumantoj aĝaj inter 20 kaj 49 jarojn respondecas pri pli ol tri kvaronoj de la kafmerkata enspezo de la lando. 80 elcentoj de la vendoj estas faritaj en kafejoj, dum antaŭ sep jaroj, tujkafaj produktoj regis totalan enspezon. Estas nun pli ol 1 500 kafejoj por ĉiu miliono da homoj en la Korea Respubliko, kompare kun 529 en Japanio, 386 en Britio kaj 117 en Usono, laŭ datenoj de Statista por 2021.

Pasis la tempo de tujaj trinkaĵoj

Kompare kun pli malnovaj generacioj kiuj vivis en granda familio kaj havis laborintensajn postenojn dum la periodo de postmilita industriigo, koreaj jarmiluloj, naskitaj inter 1980 kaj 1995, kreskis en bazaj familioj kun pli da tempo kaj mono por elspezi kun samaĝuloj. Kiel rezulto de pli da laborlokoj en la ĉefurbo, junaj plenkreskuloj svarmis tien, loĝantaj en malgrandaj apartamentoj kaj luitaj ĉambroj kiuj ne estis idealaj por renkonti amikojn aŭ rendevui.

Ĝis la jarmezso de 2010, kelkaj “ĉambraj”, establaĵoj ofertis spacon por ke gejunuloj



**En 2021,
hejmoj elspezis
trioble pli por kafo ol
por kimĉio, la
ikono de nacia
bazmanĝaĵo**

renkontiĝu, laŭ la linio de interretaj kafejoj, karaokejoj kaj individuaj “plurĉambroj” ofertantaj diversajn tabloludojn, DVD-ojn kaj videoludojn. Ili ankaŭ disponigis malpezajn refreŝigaĵojn, kiel tujmanĝeblaj nudeloj, pufmaizo kaj biskvitoj kune kun diversaj teoj, sodo kaj suko.

Kafo malofte estis elekto, kaj kiam ĝi estis proponita, ĝi kutime venis el saketo aŭ vendomaŝino, miksitaj kun laktopulvoro kaj sukero. La tiel nomata “miksita kafo”, frosta sekigita trinkaĵo elpensita de loka firmao Dongseo en la 1980-aj jaroj, iĝis la superrega speco de kafo vendita en la lando.

Fakte, usonstila kafo *americano* estis preskaŭ nepriaŭdita ĝis 1999, kiam la unua usona kafeja ĉeno envenis en Seulon. Daŭris ankoraŭ jarojn antaŭ ol la loka merkato ekŝatis espreso-bazitajn trinkaĵojn.

Envenis grava turnopunkto en 2007, kiam populara televidserio nomita *Kafa Princo* ravigis la landon per sia surprizplena amrakonto en kafejo. “Pliiĝis intereso pri trejnado de kafpreparistoj, kaj tio ankaŭ pavimis la vojon al enfluo de sendependaj kafejoj,” diras Jungee

Hong, merkatic-manaĝero de la seulo-bazita monata kafa revuo *Monthly Coffee Magazine*.

“Instagrameblaj” Kafejoj

Jaraj kafejaj enspezoj kreskis 14-oble de 300 milionoj da dolaroj en 2007 ĝis 4.3 miliardoj da dolaroj en 2018, farante la Korean Respublikon la tria plej granda kafeja merkato en la mondo, post Ĉinio kaj Usono. La merkato ne nur plivastiĝis, sed ankaŭ diversiĝis. Kafbutikoj fariĝis modaj cellokoj kiuj altiras kafej-ŝatantojn el la tuta lando kaj hor-longajn atendovicojn dum semajnfinoj. “Malgrandaj, unu-specaj kafejoj fariĝis ege popularaj, kiam junaj, tendenc-sentemaj konsumantoj serĉas produktojn, kiuj estas unikaj kaj personecigitaj. Ĝi estas formo de memsprimo kaj individueco, precipe en la epoko de sociaj amaskomunikiloj,” diras Yong-jin Kim.

Distingaj spacaj konceptoj emerĝis, de kafejoj kun botanikaj karakterizaĵoj al tiuj *Harry-Potter*-temaj, surtegmentaj aŭ kun skandinavstilaj internoj. Subskribitaj menuoj estas servataj por meti ilin sur

“

Estas tendenco, ke sentema junularo, konsumu ekskluzivajn kaj personecigitajn produktojn kiel formo de memsprimo

la mapo de sociaj amaskomunikiloj. “Kompare kun la aŭstra kafeja kulturo, kie homoj simple ĝuas la kafon, kiu ligiĝas kun konateco kaj, ofte, klientolajeco, koreaj kafejoj temas pri tendencoj,” diras Manuel Jauschnig, prezidanto (CEO) de import-eksporta firmao MRJ-grupo.

La serĉado de multekosta kaj instagramebla kafo reflektas ĝeneralan serĉon por *sohwakhaeng*, “malgranda, sed certa, feliĉo” inter junuloj. La moda vorto priskribas ilian emon aĉeti “malgrandajn luksajn” produktojn inter ilia malespero pro stagna enspezo. Frenezeco pri luksaj vestoj kaj akcesoraĵoj, fido je monpruntoj kaj kreditkartoj por kovri vivkoston estas parto de tiu tendenco.

Malgraŭ la pandemio de KOVIM-19, la nombro de kafejoj preskaŭ duobligis inter 2017 kaj la pasinta jaro, kaj ĉi tiu kresko tendencas daŭri en la venontaj jaroj.

“Junuloj malpli emas ŝpari por apartamento, geedziĝo aŭ estontaj elspezoj. Ili estas nemaltrankvilaj pri aĉetado de produkto kiun ili trovas deviga, se ĝi alportos feliĉon, eĉ se ĝi signifas pli altan prezon,” diras Yong-jin Kim. ■

-El la angla esperantigis Joel Muhire (Kongo Kinŝasa)

© Sylvie Serprix por UNESKO-kuriero



"Kafejoj estas kataliziloj de sociebleco"

Kiel lokoj de "dezirata kunĉeesto", kafejoj ebligas al homoj alproprigi la saman lokon laŭ multaj malsamaj manieroj, klarigas la franca sociologo Pierre-Emmanuel Niedzielski, aŭtoro de tezo titolita *Socieblecoj de la vendotablo: etnografio de trinkejoj* (*Sociabilités de comptoir: une ethnographie des débits de boisson*).

En la franca lingvo, kafo estas la nura trinkajo kiu havas la nomon de la vendejo kiu servas ĝin. Kiel vi difinus ĉi tiun lokon, la kafejon?

En Francio, tiu loko rilatas al aparta historio, tiu de la alveno de kafo en la landon en la 17-a jarcento, unue en la haveno de Marsejlo kaj poste ĉe la kortego

de la reĝo. Ĝia demokratiigo okazis ĉefe pro la sukceso de *Le Procope*.

Tiu ĉi pariza entrepreno fondita en 1686 estis treege sukcesa ĉar, malsame ol la tiamaj tavernoj, ĝi ofertis bone aranĝitan spacon, rafinitajn meblojn, spegulojn kaj ĉefe kafon.

Ĝi rapide altiris intelektulojn, kiuj kunportis gazetojn kaj novaĵojn. Similaj

► Ĉe Piano Vache, Parizo, muro ornamita per personaj fotoj de la klientoj



Caffè sospeso: Kiam kafo signifas “solidarecon”

Ne ĉiuj povas pagi tason da kafo ĉe la vendotablo. *Caffè sospeso* estis inventita en napolaj laboristaj kafejoj por igi ĉi tiun momenton de kunĉeesto alirebla por ĉiuj. Ĝi estas kafo pagita anticipe kiel anonima solidareca ago. La kliento aĉetas du kafejojn sed ricevas nur unu. Alia kliento senmona povas poste demandi ĉu ekzistas “pendanta kafo” havebla kaj tiel havi varman trinkaĵon sen devi pagi por ĝi.

La tradicio furoris dum la Dua Mondmilito, ĉar multaj homoj ne povis pagi manĝaĵojn aŭ trinkaĵojn. En la postmilita ekonomia ekspansio la tradicio preskaŭ formortis, sed ĝuis reviviĝon en la lastaj jardekoj. En resonanco kun la recesio kaj socia solidareca movadoj de 2008, la antaŭpagita kafo denove fariĝis simbolo de popola solidara reciproka subteno.

Hodiaŭ, malgrandaj lokaj kafejoj same kiel plurnaciaj kafĉenoj tra la mondo adoptis la solidaran kafon por antaŭenigi solidarecon – kaj aldone, por pliigi vendojn. Ĝi ankaŭ inspiris aliajn formojn de anonima komunum-spirita solidareco, kiel la tendenco “solidara butikumado”, aperinta dum la pandemio de KOVIM-19, kiam civitanoj lasis kelkajn el siaj aĉetaĵoj por fremduloj en mizero.

ejoj multiĝis en Parizo. Ilia sukceso daŭris plurajn jarcentojn antaŭ ol cedi lokon al bierejoj kaj poste al loĝkvartalaj kafejoj.

La nuancoj inter la entreprenoj kiel kafejoj, trinkejoj kaj tavernoj ĉefe reflektas diferencojn en ilia simbola alproprigo. Ili ĉiuj dividas la samajn komercajn kaj jurajn regulojn kaj estas submetitaj al la samaj postuloj. Aliflanke, estas konkreta diferenco inter kafejoj, kiuj emfazas la trinkaĵon, la produkton, prefere ol la lokon kaj la kunĉeeston.

La foresto de kafejoj estis kruele sentita dum la pandemio. Kian rolon ili ludas en la konstruado de nia sociebleco?

La pandemio emfazis nian ligitecon al kafejoj. Indas noti, ke la virtualaj kafejoj kaj aliaj interretaj renkontiĝoj, kiuj naskiĝis dum la pandemio, ne estis viglaj dum longa tempo. Kio mankis al ni dum la pandemio estis tio, kion mi nomas “dezirata kunĉeestado”. Ĝi estas karakterizita per la kapablo okupi la saman lokon kune en malsamaj manieroj.

En la kafejo oni povas interagi kun aliaj aŭ ne, veni sola aŭ grupe, sed tio, kion ĉiuj klientoj havas komune, estas, ke ili elektis esti tie. Ĝi estas loko, kie oni aliĝas al neŝksaj rondoj de societemo, amikoj aŭ kolegoj, kiujn oni ne nepre invitas al sia hejmo. Neŭtrala loko, la kafejo pli favoras renkonti homojn ol en la intimeco de apartamento.

Kiomgrade estas kafejoj instigi al socia interagado? Kiu venas al la kafejo?

Ĉio dependas de la kafejo! Ĉiu entrepreno havas siajn proprajn kriteriojn. Ekzemple, la prezoj, la trinkaĵoj, la muziko kaj la dekoracio estas ĉiuj kriterioj por elekto. Vi ne iras al ajna kafejo. Fakte, kio determinas la elekton estas identigaj faktoroj. Ni emas iri al la kafejoj, kiuj similas al ni. La mikrado estas tiel reduktita aŭ limigita per tiuj kriterioj. Kvankam estas vere, ke la kafejo estas malfermita al ĉiuj, ne ĉiuj iras al la sama kafejo.

Estas tiuj, kiuj venas kun siaj amikoj, kiuj renkontiĝas ĉe la kafejo post lernejo aŭ laboro. Vi povas iri sola labori aŭ legi, malstreĉiĝi, preni kafon antaŭ aŭ post via laboro. Vi ankaŭ povas havi pli intiman renkontiĝon tie. Se diri konkrete, la vera

demandado ne estas kiu venas al la kafejo, sed al kiu kafejo oni elektas iri.

Kiel evoluis trinkaj ritoj en la lastaj jaroj?

Ili evoluis kune kun la sociaj normoj koncerne alkoholkonsumon. Ekzemple, la praktiko proponi al ĉiuj laŭvice, ĝeneralan rondon de trinkaĵoj al klientoj, estis ankoraŭ tre ofta en Francio en la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj. Ĝi estas plejparte perdita hodiaŭ.

Ekzistas ankaŭ ŝanĝiĝanta akceptebleco de alkoholo laŭ diurnociklaj ritmoj. Tiel, mendi alkoholaĵon tage estas malpli akceptita ol malfruvespere. Oni eĉ povus diri, ke la normoj estas renversitaj post la noktiĝo, ĉar mendado de kafo post la 21-a horo ne estas konsiderata taŭga.

Tamen, kio gravas, estas konservi festan konsumon de alkoholo; malbonaj drinkantoj, aŭ tiuj, kiuj ruinigas la feston,

estas forpeltitaj. La konsumo estas reguligita de la normoj, kiuj regas la lokon, de la kelnero kaj de la aliaj klientoj, por resti en la dezirata kunĉeesto.

Kian rolon ludas la kafejoj en la vivo de sia apuda medio?

Ĉi tiu rolo diferencas laŭ la tempo de la tago. Dum la tago, kafejoj povas reflekti la identecon de strato aŭ kvartalo. Nokte, la kartoj estas rearanĝitaj kaj kio formiĝas estas kartografio de noktovivo. Loka sociebleco estas anstataŭigita per elekta sociebleco. En kamparaj kaj antaŭurbaj areoj, kie kafejoj preskaŭ malaperis, la lokaj registaroj nun klopodas stimuli la restarigon de tiuj lokoj, kiuj estas kataliziloj de sociebleco. ■

**-El la hispana esperantigis
Ursula Grattapaglia (Brazilo)**



“Ni emas iri al kafejo kiu similas al ni”

Liber'Thé, kovejo de civitaneco en Tunizo

Malfermita antaŭ dek unu jaroj en trankvila strato en la ĉefurbo, tiu ĉi kafejo iĝis grava rolulo sur la kultura ĉefurba scenejo.

Proksime de angulo de trankvila strato, marĝene de la movoplenaj avenuoj de la kvartalo Lafayette en la centro de Tunizo – jen kie oni trovas la kafejon *Liber'Thé*, kies ĉeesto estas signalita de kelkaj simplaj tabloj antaŭ la sombra fasado de moderna konstruaĵo. Malfermita antaŭ dek unu jaroj de Ghassen kaj Lassaad Labidi, ĉi tiu spaco mallarĝa, kun muroj kovritaj de libroj, estas multe pli ol nur kafejo. En nur kelkaj jaroj ĝi iĝis piliero de la alternativa kultura scenejo de la ĉefurbo.

Estas vere, ke la du fratoj dediĉis tempon por maturigi sian projekton. Ghassen, diplomita pri inĝenierado, kaj Lassaad, librotenisto, lanĉis la

“

Ekde la komenco, unu el la kernaj celoj estis oferti spacon al virinoj

projekton en 2011, kunigante la monon kiun unu el ili akiris vendante sian aŭton kaj la alia farante bankan prunton. Loki la kafejon en la kvartalo en kiu ili kreskis ŝajnis evidenta elekto. “Lokanoj jam konis nin kaj fidis je ni, do ili donis al ni sian benon”, klarigas ili.

Post la sendependiĝo la eŭropanoj foriris, tiam okazis migro de tunizaj familioj allogitaj de la novaj antaŭurboj de la ĉefurbo. Tio ŝanĝis la karakteron de la kvartalo, enportante registarajn oficejojn, ambasadorejojn, privatajn universitatojn kaj servajn firmaojn. Sed dum la lastaj kelkaj jaroj, junuloj, kiuj konsistigas la plejparton de la klientaro de *Liber'Thé*, reportis iom de la malnova ĉarmo de la kvartalo.

Kafo kiel simbolo de malavareco en arabaj socioj

Araba kafo kaj konoj kaj praktikoj rilataj al la grajnoj estas la du arabaj tradicioj pri kafo registritaj en la Listo de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj de UNESKO. Ambaŭ tradicioj estas jarcentojn aĝaj kaj asocias kafon kun respekto kaj malavareco.

Araba kafo estis registrita de Omano, Kataro, Saud-Arabio kaj Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj en 2015. Tradicie, kafo estas preparata antaŭ la gastoj. La grajnoj estas leĝere rostigitaj en malprofunda pato, poste metitaj en kupran pistujon kaj pistitaj per kupra pistilo. Post preparado en larĝa kafpoto sur fajro, la kafo estas verŝita en pli etan poton. La plej grava aŭ la plej maljuna gasto devas esti servita unue, plenigante kvaronon de la taso, kiu poste povas esti replenigata.

Etiketo postulas, ke oni trinku almenaŭ unu tason, sed ne pli ol tri.

La kafgrajnoj *Khawlani* estis priskribitaj kiel la “verda oro de Yazan”, montara regiono en Saud-Arabio. La triboj Khawlani kultivas kafarbojn jam de pli ol 300 jaroj. En 2022, tiuj praktikoj kaj konoj estis registritaj en la listo de UNESKO. La semoj estas plantitaj en tolaj sakoj plenaj je grundo kaj konservitaj en la ombro dum tri ĝis kvar monatoj, antaŭ esti plantitaj en agrikulturaj terasoj. Du aŭ tri jarojn post la plantado, la fruktoj estas kolektitaj mane. Grajnoj estas plukitaj, metitaj en platan ŝtonmuelejon kaj senŝeligitaj per cilindra ŝtono. Oferti al gastoj la kafgrajnojn kolektitajn de la propra plantejo estas konsiderata signo de honoro kaj respekto.



► Inaj studentoj studas en la kultura kafejo Liber'Thé.

© Chedly Ben Ibrahim

Societemo

Homoj envenas por amuziĝi, labori aŭ por aŭskulti muzikon. Alia, studento pri arto, ŝatas tiun ĉi lokon ĉar ŝi scias, ke ŝi ĉiam trovos amikojn ĉi tie. "Mi sentas min pli trankvila ĉi tie, for de miaj kverelantaj fratoj kaj fratinoj kaj de miaj gepatroj petantaj diversajojn", diras Safa, universitata diplomito.

Ekde la komenco, unu el la kernaj celoj estis oferti spacon al virinoj. "Nia origina ideo estis krei novan aranĝon – esti kaj kultura kafejo kaj inkluziviga spaco", klarigas Lassaad. Rezulte, inaj studentoj kaj lernejoj ne hezitas transiri la sojlon de *Liber'Thé*. "Ĉi tie, knabinoj estas respektataj kaj povas esprimi siajn opiniojn sen esti traktitaj kiel ornamaĵoj aŭ trofeaj edzinoj", konfirmas Safa post babilado kun amikoj ĉe sia tablo. "Knabinoj kaj knaboj povas babili sendepende de sia fono aŭ genro", diras alia kliento.

Refreno de kanto de Jacques Brel eliras el la kafejo. La spaco povas ne esti granda, sed la volo kaj la energio de la fratoj Labidi sukcesas forpuŝi la murojn por – depende de la tago – gastigi ekspozicion, kinejon, koncerton aŭ teatraĵon, laborspacon kaj, kompreneble, kafejon. Ĝi estas ankaŭ publika forumo, kien homoj venas por diskuti pri temoj kiel rasismo, enmigrado, civitaneco kaj ekskludo.

Liber'Thé ankaŭ sekvas tunizian tradicion kiel spaco dediĉita al societemo, interŝanĝo, debato kaj eĉ rezisto, same kiel *Taht Essour*, ikoneca kafejo jam fermiĝinta, en kiu la intelekta kaj arta elito kontraŭanta koloniismon kutimis renkontiĝi en la jaroj 1930.

Akcelilo de ideoj

"Komence, ni timis ke ĝi iĝos nur plia laŭmoda trinkejo, vizitata de viroj, kaj ke ĝi ĝenos la pacon kaj la trankvilon de la strato. Finfine, ĝi estas spaco malfermita al ĉiuj, kovejo de civitaneco, akcelilo de ideoj", diras Hédi Bouchiha, ĵurnalisto de tunizia radio, kies sidejo situas je distanco de nur tri stratoj.

Liber'Thé estas en rekta kontakto kun la zorgoj de la homoj, rolante kiel resonilo por la bezonoj kaj la idealoj de malplimulto, de tiuj junaj kaj de tiuj ne tiom junaj, kiuj

venas al debatoj en filozofiaj kaj politikaj kafejoj. "Ni ĉiuj estas, sen distingo, roluloj en la socio", insistas Lassaad, kiu estas finpretiganta novan kulturalan programon por la unua parto de 2023.

Krom tio, en 2016 Ghassen kaj Lassaad kreis la Kulturalan Asocion por Kreado kaj Optimisma Pripenso, por subteni kulturajn iniciatojn prezentitajn en la kafejo. Kelkaj, kiel *Tuniza Malferma Scenejo (Tunis Scène Libre)*, iĝis kulminoj inter la kulturaj aktivaj okazantaj en la ĉefurbo.

Sed pli ol la programo de aktivaj, kio donas al *Liber'Thé* ĝian spiriton, estas ĝia klientaro mem. "Mi sentas, ke io mankas se mi ne pasigas tempon ĉi tie", diras Seif, juna butikisto, kiu pripensas starigi naturmedian asocion kaj iniciati diskutojn pri klimato. "Ĝi estas unu el la malmultaj lokoj en kiuj oni povas lerni de libroj same kiel de homoj". ■

-El la angla esperantigis Manuela Burghilea (Brazilo)



▼ Pli ol nur kafejo, Liber'Thé iĝis piliero de la kultura scenejo de la ĉefurbo.

© Chedly Ben Ibrahim

La naturo de aĵoj

Tranĉita pomo, guto sur folio, rivero kun arĝentaj reflektoj serpentumantaj tra valo: En *M/E*, Rinko Kawauchi, grava nomo en la japana fotarto, prezentas novan serion da bildoj en sia kutima delikata stilo. Komencante en la glacia grandego de la Islandaj montoj, la serio ankaŭ esploras la mildan trankvilon de la mondo retiriginta en solecon pro la pandemio.


El la etaj aferoj de la vivo, kiujn ŝia fotilo kaptis dum jaroj – pecetojn da vitro, sapovezikon, bovlon da fragoj ŝprucigitaj per sukero – emanis poezio de la ordinara festo de vivo en miniaturo, la subtila beleco de ĉiu tago.


Tiuj ĉi momento-fotoj, kiuj kaptas la efemeraĵon, estas kongruaj kun fotoj de naturo, neniam reduktitaj al nuraj belaj bildoj. Pasante rekte de la senfina malgrandeco de neĝero al la aera vido de valo, ŝi ankaŭ ludas per lumo, kaptante la maltrankviligan strangecon de aro da birdoj en klarobskuro kaj la brilon de sunradio tra iranta arbaron.

Ĉi tiu resonanco inter ordinareco de la vivo kaj potenco de la naturo, mallumo kaj lumo, proksima kaj malproksima, donas esprimovon al ŝiaj bildoj. Ili rakontas pri la beleco kaj senviveco de la mondo. Kaj ĝia malfortikeco. Tiel ŝiaj verkoj esprimas perfekte la koncepton, ne facile tradukeblan, de *mono no aware*, kiun la verkisto Haruki Murakami priskribas kiel "la kortuŝa melankolio de la aferoj". ■

-El la angla esperantigis Kim Ribeiro (Brazilo)





















Lekciisto pri Sociologio de Komunikado kaj Kulturo en la Departemento de Politikaj Sciencoj ĉe la Universitato de Romo Tri (Italio), Domenico Fiormonte esploras, instruas kaj publikigas verkojn pri cifereca filologio, geopolitiko de scio kaj kultura recenzado de la ciferecaj komunikiloj.



S E L Ç U K

Teknodiverseco kiel la ŝlosilo al cifereca malkoloniigo

La lukto por regi ciferecan scion trafis turnopunkton. Ekonomiaj, geopolitikaj kaj kulturaj dimensioj estas ĉiuj aktivaj. La superregado de la teknikaj gigantoj ne estas la sola problemo, kiu devas esti solvita por venki la nunan malekvilibron kaj antaŭenigi ciferecan plurismon. Necesas ankaŭ vigligi la disvolvado de alternativaj, daŭripovaj teknikoj, kiuj respektas lingvan, kulturan kaj biologian diversecon.

Superregado neniam estis trafita nur per la rekonon kaj elmontrado de supera tekniko aŭ milita potenco. Scio estas potenco, kaj ĝi plenumas sian influon, kiel la itala filozofo Antonio Gramsci diris, en la kampo de kultura hegemonio, establante la limojn de kio estas kaj ne estas. Informado, edukado kaj kultura kaj scienca produktado konsistigas la profundan nivelon de geopolitika interago.

Nun, por la unua fojo en la historio, ĉi tiu kompleksa aro da ideologioj, praktikoj kaj interŝanĝado konverĝis en unuigitan medion de produktado, aliro kaj disigo: Interreto kaj ĝiaj iloj. Interreto kaj ĝiaj fratinaj teknikoj fariĝis ŝlosilaj por plenumi superregon kadre de politiko kaj sano, trejni novajn generaciojn, disvastigi sciencajn rezultojn, influi ekonomiajn elektojn kaj defii sociajn normojn. La kulturaj, estetikaj, sociaj, juraj, ekonomiaj kaj aliaj strukturoj, kiuj karakterizis la historion de la homaro ĝis la fruaj jaroj de la 21-a jarcento estis forbalaitaj de nova subjekto-objekto: *La imperio de la algoritmo*.

Granda turnopunkto

Geopolitiko iĝis cifereca geopolitiko, disputo kaj lukto por cifereca scio – ne nur por ĝia regado, sed ankaŭ por ĝia infrastrukturo kaj por la fizikaj materialoj uzataj por ĝin konstrui kaj daŭrigi. Tiuj

estas la kabloj, aplikoj, programoj, datumcentroj, metaloj, raraj teroj kaj aliaj elementoj, kiuj konsistigas la kompleksan mozaikon de geopolitiko de cifereca scio. Ne sufiĉas posedi misilojn kaj armeojn, gason kaj petrolon, ekonomian potencon, esplorcentrojn, universitatojn kaj komunikilojn, aŭ esti provizita per religia potenco, ĉar sen rego super la infrastrukturo kaj iloj por efika komunikado, tiuj resursoj estas blindaj, surdaj kaj mutaj.

Ciferecigo do reprezentas la finan stadion en la procezo priskribita de Gramsci. Ĝi montras al ni kiel la lukto por regi ciferecan scion, ekde la militoj pri regado de publika opinio en sociaj retoj ĝis disputoj pri la uzado de artefarita intelekto, estas je ŝlosila turnopunkto en nuntempa historia fazo.

Harold Innis, kanada ekonomikisto, disvolvis sian teorion pri politika, kultura kaj ideologia antaŭjuĝoj en ĉiu tekniko dum la jaroj 1950-aj. Lia teorio implicas ke la fizikaj subtenoj de teknikoj estis "premsignitaj" kun limoj kaj ligoj de iliaj fasonistoj de regantaj klasoj, ofte oligopoloj, kiuj poste regas ilin per tiuj samaj ligoj. Ĝuste kiel en la jaroj 1930-aj kaj 1940-aj, estintus nepenseble disvolvi modernan eldonan industrion sen fidinda provizado de paperpulpulo, hodiaŭ estus neeble imagi ian ajn formon de komunikado sen adekvata reta infrastrukturo.

“

La kulturaj, estetikaj, sociaj, juraj kaj ekonomiaj strukturoj de la 21-a jarcento estis forbalaitaj de nova subjekto-objekto: La imperio de la algoritmo



Kultura problemo

En mondo regata de grandaj teknikaj monopoloj estas, memkompreneble, necese ataki iliajn ekonomie superregajn poziciojn. Sed la vera problemo estas kultura. Kiel Innis klarigis, por konservi kaj disvastigi sian hegemonion, potenculoj devas fari sian plejblon por “normigi” la ilojn kaj metodologiojn de komunikado. Kaj neevitebe tio signifas malpliigon de la diverseco. Protokoloj, algoritmoj kaj programoj devas povi flui seninterrompe de unu angulo de la mondo al la alia.

Diverseco kaj rego estas maloj. Gigantoj de teknikoj, por daŭrigi sian potencon, devas venki la konkurencon, por aĉeti potencajn rivalojn kaj, kiel la usona komputikisto Jarin Lanier diras, malrapidigi novigadon kaj protekti sian teknikon (la “enŝlosan efikon”). Fine, vi ne atendus ke privata profitdona kompanio de granda teknologio investu en lingvojn kaj kulturojn, kiuj ne havas klaran merkatan valoron. Ekzemple, la serĉilo de *Google* disponeblas en 149 lingvoj, *Google Maps* en pli ol 70 lingvoj, kaj aliaj fontoj diras ke la serĉmotoro de *Google* povas subteni ĝis 348 lingvojn.

Tamen, en novembro 2020, *Google* anoncis, ke *Google Ads* (*Google*-reklamoj), esenca ero por iu, kiu deziras komerci en la interreto, subtenus nur 49 lingvojn, kaj pli ol la duono el tiuj estas eŭropaj. Sed, laŭ *Ethnologue*, enciklopedia referenca verko kiu katalogas la lingvojn de la mondo, estas pli ol 7 000 konataj vivantaj lingvoj, kio signifas, ke eĉ la plej potenca cifereca kompanio en la mondo povas reprezenti nur malgrandan procenton de la lingva diverseco de nia planedo.

Malmunti superregajn interrilatojn

Sed estas precize en tiu natura konflikto inter normoj kaj diverseco, aŭ inter

elitismo kaj cifereca plurismo, ke troviĝas ebla solvo por la problemo. Se estas vere, ke potenco nepre devas koncentriĝi kaj regi, estas egale vere, ke biokultura diverseco estas nepra kondiĉo por daŭrigi vivon sur la planedo. Tio estas nia vivasekuro, kaj teknodiverseco estos pli kaj pli necesa por alianciĝi por ĝia defendo.

Kaj ĉi tie mi ŝatus pritrakti plie la pensojn de la ĉina filozofo Yuk Hui, rimarkigante ke teknodiverseco devus ankaŭ esti komprenata kiel elekto-libereco – kiu en iuj kulturaj kunteksto povas impliki “malakcepton” de tekniko perceptita kiel invada aŭ danĝera. Alivorte, teknodiverseco estas la rajto regi ies propran “ciferecan korpuson”, lukti kontraŭ cifereca koloniismo, kaj kultivi solvojn kiuj respektas la ekologion de teritorioj, kulturojn kaj lingvojn.

Ne povas esti epistemologia kaj, konsekvence, teknika diverseco sen atenta retakso de la centra rolo de la tiel nomataj “marĝenoj” de la planedo. Ne nur ĉar estas en la sudaj regionoj de la mondo ke la materiaj resursoj, kiuj ebligas ciferecigon, estas koncentritaj, sed ankaŭ ĉar epistemicido, “la sistema detruo de rivalaj formoj de scio”, ĉiam estis unu el la ĉefaj kaŭzoj de subevoluo.

Estis la martinik-devena (franca departemento) filozofo kaj psikiatro Frantz Fanon kiu, en sia pionira verko *La Mizeruloj de la Mondo* lumigis la perversan koloniistan ideologion, surbaze de ne nur ekstraktado kaj ekspluatado de materiaj varoj kaj laborfortoj, sed ankaŭ de la nuligado de indiĝenaj kulturoj. La plej granda venko de la koloniisto, skribis Fanon, ne estas prirabi la koloniigitojn, sed konvinki ilin ke ilia kulturo estu malsupera. Kiam loka scio iĝis malgrava por siaj posedantoj, la koloniisto sekve proponis gajnantan modelon, “normon”, kiun la koloniigito malsukcesis ne adopti. Pro tio, pritrakti la nuntempan teknikan misekvilibron inter la Nordo kaj la Sudo de la planedo ne povas signifi liveri antaŭpakitajn solvojn kaj transigi

teknologion el la Nordo por plifortigi la retroagan maŝon de datum-ŝtelado, kaj poste transformi la Sudon en teknikan rubujon. Necesas kuraĝigi la disvolvadon de lokaj teknikoj, kiuj estas ekologie daŭripovaj kaj kiuj konformiĝas al la lingva, kultura kaj biologia diverseco de la respektivaj teritorioj.

Spite tion, la sudaj marĝenoj de la planedo nun alfrontas dilemon: ĉu ili devus krei siajn proprajn (infra)strukturojn de legitimiĝo, aŭ unuiĝi kun grupoj kiuj garantias videblecon kaj aliron al hegemoniaj resursoj (kaj rakontoj)? Kiun prezon diverseco pretas pagi por parta kaj perita apero? Por pluraj liberaj programar-aktivistoj estas klare, ke “*Las herramientas del amo no desmantelarán nunca la casa del amo*” (La iloj de la mastro neniam malmuntos la domon de la mastro). Sed, fakte, diverseco kaj novigo povas kunekzisti. La adopto de teknikoj kaj la konservado de lokaj landoj kaj kulturoj ne estas necesaj en konflikto. Kaj, kompreneble, la Sud-Suda dialogo estas unu el la ĉefaj elementoj por kombini ciferecan novigon kun cifereca malkoloniigo.

Ciferecaj aŭtonomigaj projektoj


Pluraj ekzemploj de navigado montras, ke novaj demarŝoj aperas en la Tutmonda Sudo. Ekde projektoj de Indiĝena Datumara Suvereneco ĝis la nealiancita teknika movado, de Grand-Datumara Sudo al projektoj inspiritaj de la popola movado, kiel la pionira FLOK-Societo en Ekvadoro. La movado de komunumaj retoj floras en Azio, Afriko kaj Latinameriko.

Latinameriko estas la centro de probable la plej grandaj sciencaj eldonadaj iniciatoj libere alireblaj en la mondo. *Redalyc*, *SciELO*, *AmeliCa* ktp defias ne nur la kontraŭpagan sistemon de eldonado apartenanta al okcidentaj entreprenoj, sed ankaŭ la anglaparolantan kulturalan hegemonion ĝenerale.



Epistemicido,

“la sistema detruo de rivalaj formoj de scio”,
ĉiam estis unu el la ĉefaj kaŭzoj de subevoluo



© Selçuk Demirel por UNESKO-Kuriero

Kelkaj dirus, ke ĉi tiuj projektoj ne estas sufiĉe grandaj por okazigi "ciferecan aŭtonomigon" en la Tutmonda Sudo. Mia respondo estas, ke transformo ne temas pri gigantaj ŝuldo-kreskigantaj fremdaj investoj kaj teknika dependeco, sed, kiel

diris la kenja verkisto Ngũgĩ wa Thiong'o, "malkoloniigo de la menso".

La mondo ŝanĝiĝas, kaj la eksperferioj ekfariĝas referenc-punktoj por pluralaj kaj daŭripovaj modeloj pri konservado, aliro kaj transdono de ciferecaj scioj.

Realigebla, plurkultura kaj justa modelo de teknodiverseco jam estas ĉi tie. ■

-El la angla esperantigis Trefflé Mercier (Kanado)

Repensi teknodiversecon

Scienco kaj teknologio estas produktoj de la kulturo en kiu ili estas disvolvataj. Inter dependiga konsumismo kaj ekonomia konkurenco, ni devas vidi tiun ĉi teknodiversecon sub malsama lumo: ĝi superas la opoziciojn inter loka kaj tutmonda, moderna kaj tradicia, kaj Okcidento kaj Oriento, helpante nin redifini nian rilaton inter ni kaj kun nia vivmedio.

Yuk Hui

Filozofo kaj instruisto ĉe Universitato de Hongkongo, Yuk Hui skribis sian doktoran tezon sub la franca filozofo Bernard Steigler ĉe la Kolegio Goldsmiths en Londono. Liaj monografioj, tradukitaj en dekduon da lingvoj, inkluzivas Pri la Ekzisto de Ciferecaj Objektoj (2016), Demando Koncerna al Teknologio: Eseo pri Kosmotekniko (2016), Rekurseco kaj Eventualeco (2019), Arto kaj Kosmotekniko (2021).

En 1914, dum la eksplodo de la Unua Mondmilito, la franca filozofo Henri Bergson donis inaŭguran prelegon titolitan “La senco de la milito” kiel novelektita prezidanto de la Akademio de Moralaj kaj Politikaj Sciencoj. Bergson, kiu plue iĝis la prezidanto de la Internacia Komitato de Intelekta Kunlaboro (praulo de UNESKO), akuzis Germanion pri “maĥinacio” kaj “mekanismo” – tiuj terminoj ofte aperas en lia mallonga prelego. Estis maĥinacio kaj mekanismo kiuj kondukis Germanion de lando de muziko, poezio kaj metafiziko al “scienca barbareco” kaj “sistema barbareco”.

Bergson vidis la disvolviĝon de mekanika scienco kaj teknologio kiel la fonton de la milito; la 19-a jarcento donis “tute neantaŭviditan plivastiĝon de la mekanikaj artoj kaj ekipis la homon en malpli ol kvindek jaroj per pliaj iloj ol ĝi faris dum la lastaj miloj da jaroj kiam li vivis sur la tero”. Ĉar ĉiu nova maŝino estis por la homo nova organo, la animo ne plu povis akomodi la dilatantan korpon. Simila analizo pri la milito reaperas en lia posta verko *La fontoj de moraleco kaj religio* (1932).

Ĉi tiu nekongruenco estas la fonto de la aroganteco kiun ni spertis en la pasintaj mondaj militoj, kaj hodiaŭ en la voko por reiri al iu *Volksgeist* (nacia spirito). Bergson esprimis sian koleron en longa listo de demandoj, el kiuj ni elstarigis unu: “Kia mondo fariĝus, se tiu mekanismo devus kapti la tutan homaron, kaj se la popoloj, anstataŭ superi sin al pli riĉa kaj pli harmonia diverseco, kiel homoj faras,

devus konformiĝi en la unuformecon de ĉio?”


Unuformeco kontraŭ diverseco

Hodiaŭ, kiel ni komprenas la diagnozon de Bergson de la artefaritaj organoj, kiuj produktas unuformecon anstataŭ diversecon? Povas esti pro tio ke ni daŭre malsukcesas kompreni la signifon de la tezo de Bergson. Se estas diverseco de homoj, ne estas pro haŭtkoloro aŭ raso, sed anstataŭe pro ilia malsama pensmaniero, kiun ni nomas noodiverseco (*noo-* venas de la greka vorto *nous* – “menso” aŭ “intelektio”). La noodiverseco estis daŭrigata per iu teknodiverseco, diversaj manieroj kompreni kaj konstrui teknologion en malsamaj kulturoj, aperantaj el la loko kaj ĉiam interŝanĝe kun aliaj lokoj.

Teknodiverseco kaj noodiverseco estas korelaciitaj, kaj siavice, ili konservas la biodiversecon de sia vivanta medio. La homa faktoro estas centra por la konservado de biodiverseco – io kio estas memevidenta por ni hodiaŭ, precipe kiam ni konsideras, ke ni eniris en tion, kion nomas la geologiistoj Antropoceno, la superregado de homoj sur la Tero. Tio estas por diri ke, ambaŭ, noodiverseco kaj biodiverseco, pli kaj pli dependas de teknodiverseco.

Tiu ĉi afero pri diverseco iom post iom malaperis dum la pasintaj jarcentoj pro diversaj kialoj. Unue, pro la miskompreno pri teknologio, oni emis pensi ke teknologio nur estas instrumento. Ni





© Nadia Diz Grana por UNESKO-Kuriero



Se estas diverseco ĉe la homoj, ne estas pro haŭtkoloro aŭ raso, sed pli ĝuste pro ilia malsama pensmaniero

povas rememori kiel, dum la modernigo en la dua duono de la 19-a jarcento, la landoj de Orienta Azio pensis, ke ili povis majstri la okcidentajn teknikojn per sia propra pensmaniero. Dum tiu periodo, ni malkovris tre similajn sloganojn kiel “ĉina substanco kaj okcidenta funkcio” (中體西用), “japana animo kaj okcidenta scio” (わこんようさい) aŭ “orienta malcentra memstara organizo *Dao* (vojo) kaj okcidenta instrumento” (동도서기론).

Ĉiuj tiuj movadoj dividas la konvinkon ke orienta pensado povas majstri okcidentan sciencan kaj teknologian, kiuj estas nur instrumentoj. Hodiaŭ, ni scias ke tiu dezirpensado nur estas vario de kartezia dualismo. Due, pro la triumfo de pozitivismismo, kiu komprenas teknologion kiel universalan, kies raciemo transiras tempon kaj spacon, ni povus diri, ke teknologio posedas universalan dimension kiel eksterigo de memoro kaj plilongigo de korpaj organoj. Tamen, teknologio ankaŭ estis fasonita kaj limigita de loko kaj kosmologio.

Limoj de navigado

Joseph Needham, brita bioĥemiisto, historiisto pri scienco kaj ĉinologo, kaj la unua direktoro de la Sekcio pri Naturaj Sciencoj ĉe UNESKO (1946-48), metis la hantantan “demandon de Needham”, kiu deziris scii kial moderna scienco kaj teknologio ne aperis en Ĉinio kaj Barato, sed nur en Eŭropo.

Tamen, tio perfidis tion, kion Needham aludis: Por li, ne estas legitime kompari okcidentan sciencan kaj teknologian rekte kun la ĉinaj, ĉar ili pli ĝuste enhavas malsamajn ontologiajn kaj epistemologiajn premisojn. Ekzemple, ontologiaj kaj epistemologiaj entoj kiel *ch'i* (vivospiro) kaj *yin-yang* en ĉina medicino ne povas esti materie

demonstritaj en anatomio. Surbaze de lia propra esplorado pri biologio, Needham adoptis la terminon “organikismo” por priskribi la ĉinan medicinon kaj la ĉinan penson ĝenerale.

Alivorte, la kulturoj ĉina kaj okcidenta havis malsamajn manierojn kompreni kaj konstrui teknologion, kaj ĝuste tion mi nomas teknodiverseco. Tiu diverseco troviĝas ne nur en la pasinteco; ni bezonas pripensi ĝin ankaŭ hodiaŭ. Ni estas ĉirkaŭitaj de ciferecaj teknologioj; tamen, ni malofte pridemandas la ontologiajn kaj epistemologiajn premojn el kiuj ili originis. Alprenu kiel ekzemplon la sociajn retojn: Ili jam premisas, ke la socio estas aro

da sociaj atomoj kaj ke la homaj rilatoj povas esti konataj kaj studataj pere de kunligado de datumoj.

Unuavide, ĉi tiuj premis-pozicioj ŝajnas problemaj, ĉar ili estis disvolvitaj en la 1930-jaroj de sociaj psikologoj kiaj estis la ruman-usona Jacob Moreno kaj la german-usona Kurt Lewin, kaj neniu antropologo konsentis kun la ideo, ke la homa socio ekis de sociaj atomoj. Tamen, ĉi tiu modelo estis imitita kaj pliigita de preskaŭ ĉiuj platformoj de sociaj retoj troviĝantaj en diversaj landoj, ĉu *Facebook*, ĉu *Vkontakte*, ĉu *Wechat*. Tio ankaŭ montras la limon de navigado pri kiu ni parolas hodiaŭ, aparte





© Nadia Diz Grana por UNESKO-Kuriero

“

Kaj noodiverseco kaj biodiverseco pli kaj pli dependas de teknodiverseco

milita ekspansio, kaj en tia formado estas homogenigo anstataŭ diversigo. Do, diversigo povus okazi nur je la plej supra nivelo, alivorte tiu de nacia identeco.

Mi sentas ke nun, pli ol neniam antaŭe, ni devas reveni al la demando pri teknodiverseco konsiderante dependigan konsumismon, malican ekonomian konkurencon kaj minacantan militan ekspansion, kiujn ni spertas hodiaŭ; aparte kiam ni scias, ke unuigita tutmonda solvo estas malfacila, eĉ neebla, kaj reiro al naciismo estas io multe pli ol dezirinda. Tio, kion konkludis Bergson en 1914 ne ŝanĝiĝis; anstataŭe, tia tendenco nur daŭras kun pli potencaj cibernetikaj maŝinoj, kiuj, kiel rezonis la usonan matematikiston Norbert Wiener, ne plu estas simplaj mekanismoj kiujn Bergson havis en la menso. La serĉado kaj antaŭenigo de teknodiverseco devus esti unu el la centraj taskoj por ni hodiaŭ, kiel Bergson kaj Needham iam instigis.

UNESKO verŝajne estas la sola organizo kiu povas proponi ĉi tiun prioritataron multe pli ol kion iu ajn individua pensulo kaj akademia komunumo povus trafi. Tiu ĉi tasko ne nur konsistas el la konservado de la kolektiva memoro de la pasinteco, pro nostalgio aŭ la malnoviĝo de la homaro, sed ankaŭ la preparado de nova prioritataro por kultivi inspiron por elpensi la estontecon per konstruado de scienca kaj kultura programo por speguli niajn rilatojn inter ni kaj kun la aliaj, kun nehomaj estaĵoj, kaj kun la Tero en malpli homogena maniero. Eble kun tia diversigo ni povus lumigi novajn vojojn el ĉi tiu senelirejo. ■

-El la angla esperantigis **Trefflé Mercier** (Kanado)

kiam ĝi enfokusigas nur efikecon kaj konsumismon.

Repaciĝo pere de diversigo

Hodiaŭ, teknologia tutmondiĝo jam igis nin ignori la demandojn pri teknodiverseco kaj turnis la problemon en opozicion inter la tutmonda kaj la loka, moderna kaj tradicia, Okcidento kaj Oriento, sen povi prezenti la demandojn pri *diverseco trans identeco*. Pierre Teilhard de Chardin, franca jezuito, arkeologo kaj teologo al kiu UNESKO dediĉis simpozion en 1981, proponis kion li nomas *la konverĝo de la noosfero*. Laŭ la teorio de Teilhard, la

evoluo povus esti konsiderata kiel evoluo de konscio, kiu realigos noosferon, per la invento kaj disvastigo de teknologio tra la tutmondo. Por Teilhard, tia konverĝo ankaŭ estas kristogenezo. Tamen, hodiaŭ ni devas aldoni al lia rimarko, ke tiu formado de la noosfero ankaŭ estas la procezo de teknologia konkurenco kaj

“

La serĉado kaj antaŭenigo de teknodiverseco devus esti unu el niaj kernaj taskoj nuntempe

Diébédo Francis Kéré:

“Mi laboras kun la naturo, ne kontraŭ ĝi”

Unua afrikano premiita per la Premio Pritzker, la plej alta distingo en arkitekturo, Diébédo Francis Kéré privilegias la sciojn kaj lokajn materialojn por krei konstruaĵojn elegantajn, respektemajn al la medio kaj koherajn kun ĝia ĉirkaŭaĵo. Lia partopreniga fokuso ebligas integri la homojn ekde la unuaj fazoj de la projekto kun la celo krei strukturojn adaptitajn al la bezonoj de la loĝantaro.



Mi laboras per atingeblaj materialoj, kiuj havas sencon por la loko kie mi konstruas

Vi naskiĝis en la vilaĝo Gando, en centrorienta Burkina-Faso. Kiel vi fariĝis arkitekto?

De kiam mi estis en la bazlernejo, mi volis plibonigi la klasĉambrojn de Burkina-Faso. En mia studenta epoko, ni suferis pro varmo, amasiĝo kaj malmulta lumo. Mia deziro transdoni al estontaj generacioj pli bonajn lernkondiĉojn instigis min elekti karieron en arkitekturo.

Mi studis en la Teknika Universitato de Berlino kaj poste adaptis la lernitajn al la kunteksto en kiu mi volis konstrui. Miaj instruistoj stimulis min evoluigi konstrumetodojn tradiciajn kaj uzi lokajn materialojn. Danke al ili, mi komprenis, ke ne nur temis pri afero de intereso aŭ persona gusto, sed ke mi ankaŭ povus signife kontribui al arkitekturo ĝenerale.

Unu el viaj unuaj projektoj estis la lernejo de Gando, kiun vi decidis konstrui per kruda grundo anstataŭ uzi cementon aŭ betonon. Kiel vi tion decidis?

Mi konsideras min oportunisto de la materialoj: Mi laboras per tio, kio estas

ĉe mia mano, kaj havas sencon pri la loko kie mi konstruas. Povas esti betono, se la kunteksto ĝin pravigas. Mi kredas, ĉefe, ke oni devas uzi materialojn, kiujn la lokanoj scipovu uzi por ke plutenado de la konstruaĵoj estu farita de profesiuloj de la regiono kaj ĝi okazu per minimuma strebo. Mi aplikis tiun ĉi principon en lokoj ne konsideritaj de la nuntempa arkitekturo kaj tio permesas al mi apliki ĝin en aliaj kunteksto nun.

Vi decidis ligi la loĝantaron al tiu projekto kaj al ĉiuj sekvaj, kial tiu ĉi postulo?

Mi dediĉis multe da tempo preparoli la temon kaj mi strebis, por ke ĉiuj najbaroj de Gando sentu sin ligitaj al la projekto. Mia fokuso estis komplete nova. Mi proponis al ili konstrui per materialo konata, sed malmulte valorigita, kaj mi klarigis, ke en la universitato mi studis tiujn teknikojn, kiujn en Afriko oni kutime lernas per generacia transdono.

Por konvinki ilin, mi prezentis miajn ideojn pere de eksperimentoj kun ili por demonstri ke la ideoj funkcias. Tiu sperto instruis al mi kelkajn aferojn. La unua





Alloga dezajno kaj arkitekturo respektama al la medio ne ekskludas unu la alia

rilatas al selektado de materialoj. Kiam la rimedoj estas malmultaj, oni devas ĉesi pribedaŭri kaj diri “ni ne povos tion fari!” aŭ “ni devos importi materialojn!”. Mi ŝatas la ideon, ke manko de rimedoj estu, anstataŭe, motoro por navigado.

La alia instruo estas, ke oni devas dediĉi tempon por konvinki. La fido ne nur kreiĝas per raciaj klarigoj, sed naskiĝas de inkluzivigo kaj partoprenigo. Tiu ĉi metodo ankaŭ ebligas eltrovaĵon de solvoj ne antaŭviditaj se la problemo estus ekzamenita je distanco, sen inkludi la interesitan loĝantaron.

Kiel oni povas vivigi konstruaĵon?

Laŭeble, mi klopodas kunlabori kun la naturo kaj ne agi kontraŭ ĝi, kio donas ja certan ideon pri la spaco. Ni tion faras, ĉefe, prenante materialojn rilatajn al la naturo kaj klopodante doni al la endomaj spacoj econ plurfunkcian, kreante spacojn kie la homoj sentas sin komfortaj kaj ĝuas pasigi tempon.

Kiu estas la ligo inter arkitekturo kaj socia egaleco?

La homo kaj la mondo kie ni loĝas estas la elir-kaj-enirpunkto de mia laboro. Se neniu bezonas konstruaĵon, kial ni

ĝin konstruu? Kaj se neniu uzas mian konstruaĵon, por kio ĝi taŭgas? Spaco ekzistas reale nur kiam oni ĝin uzas, male ĝi perdas sian sencon. Tio ĉi ne signifas, ke arkitekturo rezignu krei eksterordinarajn verkojn kaj ampleksigi siajn limojn, aŭ provi novajn ideojn kaj konceptojn, sed por ke konstruaĵo longe daŭru, necesas, ke la homoj deziru vivi en ĝi. Almenaŭ tion mi klopodas atingi kiam mi konstruas ion.

Vi pledas por “urboj koheraj kaj pacaj”. Kion tio signifas?

Laŭ mia kompreno, tiu koncepto temas pri urboj, kiuj apartenas al ties loĝantoj, konceptitaj por tiuj personoj. Ju pli plaĉaj estu la urboj, danke al spacoj invitantaj al ripozo kaj kuniĝo, des pli pacaj estos ĝiaj loĝantoj. Tio estas grandega defio, sed oni devas ĝin alfronti, vole-nevole.

La konstruaĵoj de vi kreitaj elstaras pro malalta konsumo de energio kaj pro uzo de lokaj materialoj rezistemaj al varmo. En kunteksto markita de tutmonda varmiĝo, kial tiuj praktikoj ne ankoraŭ disvastiĝis pli vaste?

Por mi temas pri aspekto tiom nedisigebla de arkitekturo, ke ĝi tute

▀ *Klasĉambro en la Bazlernejo de Gando en Burkina-Faso, la unua konstruaĵo dezajnita de Francis Kéré.*



nature estas en la centro de miaj kreaĵoj. Gravas, ke ĝi estu vidpunkto tutmonda kaj ke oni ne limigu sin sekvi la plej novan modon aŭ ŝajnigi sin pritrakti tiun problemon sen konsideri ĝian grandegan kompleksecon.

Vi estas la unua afrika arkitekto premiita per la Premio Pritzker, la plej alta premio de via profesio. Kion ĝi signifas por vi?

Por mi tio estis grandega surprizo kaj, kvankam pasis kelkaj monatoj de la anonco, ankoraŭ malfacilas por mi kredi, ke mi gajnis ĝin. La premio ebligis al mi atingi publikon multe pli grandan kaj samtempe mi ĝin ricevis kiel ŝancon kaj respondecon.

Kiel vi vidas la estontecon de la ekologia surloke elpensita arkitekturo?

Mi ne povas respondi nur tiun demandon, ĉar tio implicus, ke la spertuloj tutmonde agas konsiderante la limigitan karakteron de niaj rimedoj. Mi ja vidas generacion, kiu komprenas, ke altnivela dezajno kaj arkitekturo respektama al la medio ne ekskludas unu la alian, sed, male, ili povas sin riĉigi reciproke. Tiu simbiozo povas doni surprizajn rezultojn.

© Kéré Architecture



▼ Lokanoj dekomence partoprenas en la konstruado de lerneja biblioteko de Gando.

Vi dezajnis konstruaĵojn ne nur en via lando, sed ankaŭ en Kenjo, Malio, Usono, Eŭropo, Ĉinio... Kiuj estas viaj venontaj projektoj?

Ni ĵus inaŭguris la Komunuman Ludejon de Kamwokya en Kampala, Ugando, kiu estas projekto spegulanta ĉiujn trajtojn de mia laboro. Samtempe, ni konstruas la sidejon de la Nacia Asembleo de

Benino kaj havas aliajn laborojn survoje por evoluigi edukajn infrastrukturojn en Burkina-Faso.

Krome, ni realigos aliajn projektojn en Germanio, Portugalio kaj Togolando. Ni ege dankas pro la ŝanco plu eksperimenti kaj povi alporti nian fokuson al novaj lokoj. ■

-El la angla esperantigis Maritza Gutiérrez (Kubo)

► Konstruo de lerneja biblioteko en Gando.



© Kéré Architecture

Transformi edukadon: Prioritatigi la sanon kaj bonfarton de la lernantoj

Tra la landoj ĉirkaŭ la mondo ekzistas agnosko, ke lernejoj sanprizorgado kaj nutrado estas bona investo je infanoj kaj adoleskantoj, tamen en la praktiko, la loka realo estas tute maladekvata. Tion rimarkigas nova raporto *Lerni kaj prosperi*:

Lerneja sanprizorgado kaj nutrado tra la mondo, kunmetita de UNESKO, UNICEF kaj la Monda Nutraĵa Programo (MNP, angle WFP), aperinta en la 8-a de februaro 2023. Ĉar la mondo alfrontas tutmondan krizon pri nutrado, oni devas fari pli por certigi, ke naciaj investoj en lerneja

sanprizorgado kaj nutrado estu liveritaj kaj ke ili kontentigu la bezonojn de ĉiuj lernantoj – aparte tiujn kiuj plej riskas esti priforgesitaj. ■

**-El la angla esperantigis
Orlando E. Raola (Usono)**

Teorio vid-al-vide Praktikon

Preskaŭ ĉiu lando en la mondo inkluzivas sanprizorgadon kaj bonfarton inter la celoj de la lerneja edukado

Sed la realo surloke estas tre maladekvata.

9 el 10

landoj havas regulojn pri sano kaj nutrado en lernejoj.

80%

el la landoj havas regulojn pri manĝodisdonado en lernejoj

388

milionoj da infanoj en 161 landoj, tio estas, duono de ĉiuj infanoj kiuj frekventas bazlernejojn – ricevas manĝojn en lernejoj.

1 el 3

lernejoj ne havas puran trinkakvon nek taŭgajn sanitajn servojn.

48%

el ĉiuj infanoj en lernejoj sen pura akvo loĝas en la plej subevoluintaj landoj.

Nur
51%

el la landoj tutmonde liveras lernejajn programojn pri mensa sano kaj preventado de mensaj malsanoj.

Sanprizorgado kaj nutrado en la lernejoj certigas gravajn edukajn rezultojn


↑ 9% kaj 8%

plialtiĝoj de enregistriĝo kaj de ĉeesto, kiam oni enkondukas lerneajn manĝojn



↑ 5%

pli alta probableco sukcesi pri legado kaj matematiko kiam la lernejo liveras testadon de la vidkapablo kaj okulvitrojn.



↓ 62%

malpliigo de forestado kiam oni ekagas por preventi malarion.



↓ 21% is 61%

malpliigo de foresto en malriĉaj landoj kiam oni instigas lernanojn purigi siajn manojn.

↓ 50%



malpli da lerneja malĉeesto kiam oni preventas violenton kaj ĉikanadon en la lernejoj.




Fontoj: Bundy, D. (2011); Drake kaj aliaj. (2017); Glewwe, kaj aliaj. (2016); Fernando kaj aliaj. (2006); McMichael (2019); UNESCO (2014, 2019a, 2019b).

Plej oftaj temoj en reguloj pri lerneja sanprizorgado kaj nutrado


Manĝaj-provizado




Seksa edukado



Sportumado



Edukado en senfuma medio



Fontoj: WHO (2022b); UNESCO kaj aliaj. (2021); WFP (2020); UNESCO (2022); WHO (2021b).

80%

el la landoj havas ĉi-momente regulojn pri liverado de manĝaĵoj en lernejoj.



Reguloj kaj financa subteno ege gravas

90%

de la kostoj de programoj por liverado de manĝaĵoj en lernejoj estas pagataj de naciaj fontoj.

Inter 2013 kaj 2020, la kvanto da infanoj kiuj ricevas manĝaĵojn en la lernejoj pligrandiĝis je **9% tutmonde kaj je 36% en la plej malriĉaj landoj.**

Fontoj: WFP 2020, WFP/Hugh Rutherford

Edukado pri sanprizorgado kaj bonfarto estas parto de la lernejaj studkampoj en plejparto de la landoj tra la mondo

9 el 10

landoj inkluzivas sportumadon inter la devigaj studoj.



Pli ol 4 el 5

landoj inkluzivas seksan edukadon.

3 el 5


landoj liveras dentan prizorgadon en la lernejoj.

3 el 5

landoj kondukas edukadon pri manĝaĵoj kaj nutrado

Fontoj: UNESKO (2022); UNESKO kaj aliaj. (2021); WHO (2018); Petersen kaj aliaj. (2020).

Enga i studentojn en esencajn servojn por sanprizorgado kaj subteno pere de lernejoj servoj pri sankonserva nutrado (SSN)



Ceteraj mankoj en la subevoluintaj landoj



Fontoj: WFP (2020); GCNF (2021); WHO kaj UNICEF (2020); WHO (2021e).

Novaj eldonaĵoj



Bintou kaj Issa en la Insulo Gorée

ISBN 978-92-3-100578-7

44 paĝoj, 200 x 200 mm, broŝurita, €6.50

Eldonita de UNESCO Publishing/Langages du Sud

Bintou kaj Issa ferias en Dakaro, do ili profitas la okazon por viziti la Insulon Gorée. Kune kun Avo kaj Avino, kaj siaj geamikoj Awa kaj Felix, ili enboatiĝas kun aliaj turistoj, plenkreskuloj kaj infanoj. La infanoj tuj rimarkas, ke tiu inica vizito spuras la historion de sklaveco, ĝia abolicio, kaj komprenas la gravecon batali kontraŭ rasismo kaj diskriminacio.

Kreita kadre de la projekto "La vojoj de sklavigitaj homoj" de UNESKO, ĉi tiu ilustrita libro celas transdoni la historion kaj memoron de sklaveco al la novaj generacioj, kaj ĝi estas la unua el serio de libroj por infanoj en la aĝo de 5 ĝis 9 jaroj.



Raporto 2023 de UN pri la Evoluo de la Akvaj Resursoj en la Mondo

Partnerecoj kaj kunlaborado por akvo

ISBN 978-92-3-100576-3

212 paĝoj, 210 x 297 mm, broŝurita, €55

Eldonita de UNESKO nome de UN-Akvo

Laŭ la ĝisnuna rapideco, la progreso de la sesa Daŭripova Evoluiga Celo de UN ne iras laŭ la ĝusta vojo. La 2023-a eldono de la raporto priskribas kiel starigo de partnerecoj kaj plibonigo de kunlaboro en ĉiuj aspektoj de daŭripova evoluigo estas necesaj por akceli la progreson al ĉiuj atingoj de la sesa Daŭripova Evoluiga Celo kaj la efektiviĝo de la homa rajto je akvo kaj sanitaĵoj.

Pro tio, ke akvo kontribuas al ĉiuj tri kolonoj de daŭripova evoluigo (ekonomia, socia kaj media) kaj influas sur multajn sektorojn, necesas esplori la eblecojn starigi novajn modelojn de partnerecoj kaj kunlaborado sur ĉiuj niveloj, kaj lokaj aŭ urbaj kaj naciaj aŭ tutmondaj.



Administrado de Transnaciaj Mondheredaĵaj Lokoj de UNESKO en Afriko

ISBN 978-92-3-100543-5 (anglalingva eldono)

202 paĝoj, 170 x 240 mm, bindita, €51,99

Eldonita de UNESCO Publishing/Springer


Transnaciaj Mondheredaĵaj lokoj de UNESKO estas la plej nova esprimo de internacia kunlaboro: Riĉiga sperto de interkultureco kaj interpopola dialogo. Tiuj iniciatoj havigas unikan okazon por esplori kaj interŝanĝi efikajn kaj daŭripovajn solvojn al nuntempaj problemoj, kiel klimatsanĝiĝo, migrado, integriĝo, konfliktoj kaj multaj aliaj.

Por la unua fojo, ĉi tiu publikaĵo prezentas la plej ĝisdatigitan kaj ampleksan laboron pri Transnaciaj Mondheredaĵaj Lokoj de UNESKO en Afriko, reflektante la interfakajn kaj prospektivajn alirojn, kiuj superregas ĉe esplor- kaj konservadmetodaroj jam de la lastaj jardekoj.


-El la angla kaj hispana lingvoj esperantigis
Pablo León (Argentino)

Tetrinkejo

LA TETRINKEJO



De antaŭ 5 000 jaroj Ĉinio trinkas teon. Tetrinkejo estas ne nur ejo por trinki teon, sed ankaŭ publika spaco por ĉinaj civitanoj. En 1956, ĉina verkisto Lao She verkis la dramon "Tetrinkejo", kaj en 2011 ĉina esperantisto Liu Ling tradukis tiun ĉi klasikajŝon.



Kosto: **10** eŭroj Afranko: **10** eŭroj

Esperanta
Tetrinkejo





Kafo de Yunnan

La kafplantado en Yunnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio, povas esti spurita al la jaro 1892, kaj grandskala kafplantado komenciĝis meze de la 1950-aj jaroj. Hodiaŭ la plantej-areo de la provinco okupas 70% de la landa, kaj kafa produktkvanto korespondas al 83% de Ĉinio. La normigo kaj industriigo de kafo helpas lokanojn de ĉiuj etnoj kreskigi sian enspezon.

Multaj voĉoj, unu mondo

UNESKO-Kuriero estas eldonita en la ses oficialaj lingvoj de UN, kaj ankaŭ en la kataluna kaj Esperanto.



Abonu la presitan version en ĉiu trimonato aŭ abonu 100% senpage la bitversion.

Malkovru niajn ofertaĵojn



<http://www.espero.com.cn/>; <http://esperanto.china.org.cn/>;
<https://www.chinaesperantoligo.com.cn/kuriero/>

Kultura Identeco — Nemateriaj Kultura Heredaĵo

20-jariĝo de Listo de
Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj
de UNESKO

